


# juna amiko

APRILIO 2010

N-ro 1/2010 (127)

INTERNACIA ESPERANTO-REVUO DE ILEI POR LERNEJANOJ KAJ KOMENCANTOJ



Post tri  
monatoj  
denove IIIK  
(Vidu p. 50)



# MALNOVAJ METIOJ 1

*Serio de Pavel Rak*

muelisto



Kiam greno estis hejme, oni bezonis mueli kaj fari el ĝi farunon. Tion oni faris en muelejo kaj akvo donis la energion.

kuiristo




Jen la plej bona metio! Li aŭ ŝi povas fari el faruno, verdaĵo kaj viando bongustaĵon.



# Rapidtrajnoj – alternativo al aviadiloj?

Dum mi skribas, la ĉielo estas silenta. Aviadiloj ne rajtas flugi en norda kaj centra Eŭropo pro la islanda vulkano. Centoj da miloj da homoj ne povas atingi siajn vojaĝcelojn. Ĉu ekzistas alternativoj al flugado? Feliĉe, multaj landoj de eŭropo jam konstruis alt-rapidajn fervojojn; ĝis distancoj de 800 km. (kaj 1200 km. kaze de nokta vojaĝo) ili povas funkcii kiel alternativoj al flugado. Slogano de la germana fervojo sumigas tion "trajno – duoble pli rapida ol aŭto – duone kiel aviadilo." Tiu deziro kompreneble ne rilatas al la pura rapideco (aviadilo 900 km/h, trajno 300 km/h), sed al la praktika vojaĝtempo. Trajno atingas la centrojn de urboj kaj ne postulas la ĉiam pli komplikajn flughavenajn kontrolojn por eniri la veturilon.

Francio lanĉis altrapidajn trajnojn en 1983, per TGV, kaj nun havas kvin liniojn; TVG penetras en Svision, Belgion kaj Nederlandon, la lastaj du laŭ propre konstruitaj rapid-linioj. Sekvis Germanio kun ICE (vidu la bildon), kun du novaj linioj kaj bonigo de pluraj ekzistantaj; ICE-trajnoj eniras Svision, Danlandon kaj Aŭstrion. TGV kaj ICE trajnoj nun ligas Francion kaj Germanio laŭ kelkaj transirejoj. Trajnoj *Eurostar* rapide ligas Londonon kun Parizo kaj Bruselo tra la tridek kilometra submara tunelo.



Hispanio kaj Italio malfermis rapidliniojn; ene de kelkaj jaroj eblis vojaĝi rapidtrajne inter Parizo, Barcelono kaj Madrido. Svedio havas rapidtrajnojn, kiuj uzas ekzistantaj trakojn. En Azio, la pioniro estis Japanio, sed nun ekzistas rapidtrajnoj en Ĉinio kaj Koreio.

La eŭropaj trajnoj certe estas plenplenaj en la nunaj tagoj; eĉ kutime ili estas tre popularaj, do ne estas granda eblo akcepti milojn da ekstraj pasaĝeroj. Espereble la polikistoj komprenos la strategian gravecon de bona reto da rapid-fervojoj kaj investos pli da mono en novaj projektoj.

smg

## Karaj geamikoj.

mi nomiĝas Julianna Vas-Szegedi, kaj mi ŝatus fabeli al vi ion interesan: eĉ ĝis nelonge mi ankoraŭ estis tia simpla leganto de JUNA AMIKO, kiel vi, kara leganto! Mi de jaroj mendis ĉi tiun belan, bon-kvalitan revuon, ĝoje mi legis ties artikolojn, lernis la lingvon pere de ĝi, kaj solvis la interesajn enigmojn.... neniam pensante ke iam ankaŭ mi iĝos redakciano de la gazeto... Nun okazis: de tiu ĉi ekzemplero ankaŭ mi havas eblon redakti mian favoratan eldonaĵon.

Kiam mi komencis serioze lerni Esperanton, antaŭ dekdu jaroj, mi lernis sen instruisto.

Al mi plaĉis ĉi tiu melodia lingvo, kaj aŭtodidakte mi komencis lerni. Post kelkaj semajnoj mi pensadis: ĉu ankaŭ aliaj en la mondo lernas ĉi tiun lingvon? Eble jes, ja oni diras pri ĝi, ke ĝi estas internacia lingvo. Se ankaŭ aliaj lernas ĝin, ĉu la lingvo havas literaturon, kulturon kaj eĉ gazetaron? La penson sekvis agado: mi komencis serĉi en la biblioteko Esperantajn ĵurnalojn, gazetojn....sed loĝante en eta vilaĝo, la rezulto iom malgajigis min: mi trovis nenian Esperantan eldonaĵon. Mi havis alian ideon: se estas lernantoj pri Esperanto, devas esti iu asocio, kiu kolektas tiujn membrojn, kiuj lernas tiun lingvon.... kaj fine mi venkis: mi eltrovis pri *Hungaria Esperanto-Asocio*, kaj iu esperantisto estis tiel kara, ke li informis min pri la tiama situacio de Esperanto, kaj sendis al mi kelkajn E-revuojn kaj gazetojn! Vi povas imagi mian ĝojon, kiam mi elpakante la grandan koverton de HEA trovis en ĝi eĉ du ekzemplerojn de Juna Amiko. De tiam mi preskaŭ konstante estas feliĉa leganto de nia revuo.

Sed mi estas komencanto! Komencanto – en la redaktado, mi bezonas multan helpon! Karaj miaj junaj amikoj: helpu min! Helpu – per viaj interesaj rakontoj, fabeloj, priskriboj... Sendu al mi viajn artikoletojn, skribu kuraĝe pri via vivo – min certe interesos ĉio, kio interesos vin – por ke mi havu multan laboron: tiel mi povos pli rapide eklerni la redaktadon! Ju pli da laboro, des pli da lernado kaj des pli da ĝojo! Kaj kompreneble des pli da sukceso! Via sukceso estos mia sukceso, via ĝojo estos mia ĝojo! Laboru kaj ĝoju ni kune!



Julianna Vas- Szegedi, Hungario, 2010.



La redakcia transformo prezentita en la antaŭa numero jam komenciĝas. Vi ĵus legis enkondukon de nova redakcia kolego. Kompreneble tiu transiro bezonas tempon; en postaj numeroj ni prezentos aliajn novajn kunlaborantojn, kiuj laŭgrade transprenos la laboron. Ni kalkulas ankaŭ je vi – sendu al ni artikolojn aŭ rakontojn. Se vi havas komputilajn lertojn kaj pretus sendi jam enpaĝigitajn paĝojn, nia ĝojo estus ekstermezura. Ni baldaŭ aperigos gvidilon cele al tio!

Post la signifa malfruo de la antaŭaj du numeroj, la fakto ke la aprila numero vere eniris presejon en aprilo estas mal-minora miraklo. Do, ĝuu la numeron!

smg, aprilo 26, 2010

## Nia oferto

Rapidtraĵoj – alternativoj al aviadiloj? Postcindraĵoj pensoj (smg)	3
Kio estas JER? Pri junulara renkontiĝo (Julianna Vas Szegedi, HU)	6
LUME: Bestoj ekiras. Parigu bestojn kun veturiloj. (Stefan MacGill, HU/NZ)	8
LUDE: Rakontu al mi 2. Pli da infan-desegnaĵoj (Monika Molnar, CH/HU)	10
Korputilo. Lernu pri la utilo de via korpo, nomu korpo-partojn! (smg)	12
La signifo de pupuro. Pluiras nia kolor-kalejdoskopio. (smg)	13
Litera sudoku por solvi – rekte el la tombejo liverita! (smg)	14
Solvo-paĝo. Solvoj al enigmoj el la antaŭaj du numeroj. (smg)	15
Legu kaj Ĝuu! Nova rubriko kun premioj (Malgosia Komarnicka, PL/DE)	16
Kuniklo demandadas. Kvinokvizo laŭ la kutima modelo (smg)	20
Divenu! Rebusoj je kiuj rompi vian kapon. (G. Kurucz, HU)	26
Humuro: streĉu viajn rid-muskolojn (Imre Szabó, HU; Jadranka Mirić, RS)	27
InterKultura Mondo: verdaj papilietoj flugas fokusen. (Elena Nadikova, RU)	28
Afrik-Kuba legendo (José J. Campos Pacheco, CU)	31
Guillen, la nacia poeto de Kubo (José J. Campos Pacheco, CU)	32
El nia literaturo, Eli Urbanová (Baldur Ragnarsson, IS)	34
El nia historio: Nobel-premioj pri paco (Á. Rátkai, HU)	36
Otokar Batlička: Stranga okazintaĵo (Dieter Berndt, DE)	37
Konversaciaj temoj. Dorlot-bestoj (Judit Felszeghy, HU)	40
Kanĵi kaj Amane. Dialog-rakonto el Japanio (Jasuo Hori, JP)	43
Esperanto kaj mi: retejoj, kursoj, ekzamenoj... (Katalin Kováts, NL/HU)	44
Verda Paĝo: kiel argumenti por Esperanto. (Geza Kurucz, HU)	46
Lingva Doktoro. Lando-nomoj en Esperanto (G. Kurucz, HU)	47
Kvizo-ludo, kun la rezultoj el 2009 (Dieter Berndt, DE)	48

Nia hejmpaĝo: <http://www.junaamiko.inf.hu>. Vidu ankaŭ la bibliotekon ĉe [www.lernu.net](http://www.lernu.net)






**KIO  
estas  
JER?**



JER estas mallongigo de Junulara Esperanto Renkontiĝo. Ĉi tio estas bonetosa, familia evento tradicie organizata en printempo de Hungara Esperanto-Junularo (HEJ) por ke la novuloj kaj ne-plu-novuloj povu renkontiĝi, la komencantoj kuraĝe provu ekparoli Esperante en amikeca rondo. Ĝi ne estas amas-programo, ĉefe hungaroj partoprenas ĝin, ĝenerale 30-50 gejunuloj, nun iom pli, kaj ĉi-foje ĝi havis ankaŭ seson da eksterlandaj gastoj.

Sed se iuj partoprenantoj ankoraŭ eĉ ne povis perfekte konversacii Esperante, ili havis ŝancon krokodili kun tiuj geesperantistoj, kiuj jam delonge partoprenas la saman eventon kaj kiuj povas rakonti al ili pri interesaj travivaĵoj dank' al Esperanto. Krome, tiam HEJ-anoj havos iom da tempo por kunsidi kaj preparoli siajn ideojn por la estonteco.



Ĉi-jare JER estis aranĝita en riverborda urbeto, Tiszafüred, fine de marto.

Tiszafüred havas ĉ. 11.000 loĝantojn, situas sur la bordo de la rivero Tisza, rande de Hortobágy. Tisza ankaŭ ĉiam ludis gravan rolon en la vivo de la urbo. Tiszafüred estas la plej granda loĝloko kaj turisma centro de la Tisza-laga regiono.

La urbo kaj ĝia

ĉirkaŭaĵo estas favorata ripozejo kaj ĝi garantias trankvilecon por la gastoj, kiuj sopiras la kvietan belan naturon. Kiuj unufoje admiras ĉi tion, tiuj enamiĝinte de jaro ĝis jaro revenas ĉi tien. La riverboarda tereno kuŝas en nacia parko, sekve ĝi






estas tre bone protektata. Apud Tisza la urbo havas alian grandan trezoron, varmfontan akvon; la turistojn atendas 39-grada varmfonta banejo. Interesiĝantoj pri popol-kulturo povas ekkonatiĝi kun la fama potista tradicio de Tiszafüred kaj povas viziti Muzeon „Kiss Pál”.

Funkcias en la urbo du famkonataj potistaj metiejoj. La tie faritaj folklor-artaĵoj gardas la belajn memorojn pri la ripoz-tempo pasigita ĉi tie.

Dum la semajnfino oni havis eblecon ekzerci Esperanton, distriĝante ekkoni la urbon mem (tage-nokte), eklerni diversajn dancojn sub gvido de spertuloj (ekz. ventro-dancadon, valson, kaj latinamerikajn dancojn).

La formala urbo-ludo inkluzivis vizitojn en kvar grupoj al la urba kooperativa ŝpar-banko kun bonvenigo de la direktoro, al la kortumo kun akcepto de unu el la kvar kortumaj juĝistoj kaj al la fajro-brigadejo.

Eblis per veraj tradiciaj hungaraj sagoj pafarki, manlabori, nokte ludi pokeron, trinki bongustan teon aŭ koktelaĵon kaj sabate nokte manĝi bongustan tortegon.



La sekva bonetosa JER 2011 estos aranĝita en urbo Szeged, kaj ni esperas ke ankaŭ kun vi, kara leganto, ni povas tie renkontiĝi persone!


Julianna Vas-Szegedi





# LUME

LA UNUA MIRINDA ETAĜO



Rubrikestro:  
Stefan MacGill

*Jen versoj pri bestoj kiuj veturas! Laŭtleĝu ilin, aŭ petu iun laŭtleĝi ilin al vi, kaj vi desegnu liniojn inter la bestoj kaj iliaj veturiloj (iloj por veturi). Atentu, kelkfoje du bestoj uzas unu veturilon, kaj en unu kazo unu besto uzas du veturilojn! Kiu estas tiu besto?*

Pedalas la kuniklo  
Pluiras per biciklo.



Promenas la gazelo  
En jaĥto kun kamelo.



Trajne iras ŝafo  
Kune kun ĝirafo.



Atentu! Rinocero  
Petolas en telfero.

Peza elefanto  
Sidas en Trabanto.





Iradas krokodilo  
Buse kun gorilo.

Ripozas la dazipo  
Kroze en la ŝipo.




Aŭte iras urso  
Cele al ekskurso.

Ho, hipopotamo  
En pramo kaj en tramo.













Glit-iras la boao  
Longe en boato.



Aviade iras apro;  
Apude sidas kapro.




Tra neĝo iras tigro  
Slede al la migro.



Jen la dek ses bestoj sur ĉi tiu paĝo! Laŭte diru ilian nomojn! Vi helpu al ili veturi! Ligu la bestojn kaj la veturilojn! Fine, elektu viajn ŝatatajn bestojn kaj desegnu ilin en aŭ sur la ĝustaj veturiloj! Sendu al ni viajn bildojn!







## Rakontu al mi... - 2




Ĉu vi memoras la rakonton pri la arbo? Kontentulo ridetis, kiam la infanoj komencis diskuti, ĉu la pomo aŭ la banano estas pli bona. Nesurprize, ke la acida citrono havis ŝancon ĉe neniu.


- Trankviliĝu, infanoj! Ne komencu disputi, ne valoras. Ĝuste tio estas bela, ke ni povas havi plurajn, diversajn fruktojn. La naturo estas mirinda, kaj meritas nian atenton. Ĉu vi scias, ke 2010 estas dediĉita al ĝi? Foje la jaro estis la jaro de la lingvoj, foje la jaro de la terpomo aŭ de la astronomio. Tiu ĉi jaro estas la jaro de la ... Se vi jam scias, mi gratulas vin! Se ne, jen vi povas trovi indikon en la sekva historio. Kolektu la substrekitajn dikliterojn, kaj metu ilin en la bonan vicordon. Vi tuj havos la respondon! Intertempe ĝuu la novan rakonton, kaj ne forgesu, ke eble unu sola floro ne ŝanĝos la mondon, sed se ĉiuj zorgos pri almenaŭ unu floro...

### Unu floro


verkis Manon Benoit /Manon Benoac/




Estis foje infano, kiu volis kreskigi floron. Li bone preparis la teron kaj metis semon en ĝin.




Post iom da tempo, aperis floreto sur tiu loko. La floro estis bela, sed malgranda.



Ĝi ricevis sunon kaj pluvon abunde, sed ne tro, do ĝi kreskis, kreskis.




La floro fartis bone kaj ĝi fariĝis ĉiam pli kaj pli bela.




Iun tagon infano venis kaj plukis la floron. Eĉ ne plukis, elradikigis ĝin!




Li metis ĝin en belan vazon, sed la floro estis tre malgaja.




La infano vidis la malgajecon de la floro. Li ne tuj komprenis ĝin.



Li kompatis ĝin kaj ekhavis ideon. Li forigis la floron el la vazo kaj ...




... li portis ĝin en la ĝardenon. Li replantis la floron apud alian floron.



La du floroj estis tre kontentaj, feliĉaj kaj fariĝis amikoj.



Ili amis unu la alian, kune pasigis la tagojn, kaj salutis ĉiujn birdojn.



Post unu jaro ili ekhavis multajn, etajn, buntajn bebo-floretojn. Belege!

2010 estas la jaro de la:


--	--	--	--	--	--	--	--	--	--	--	--	--	--	--




# KORPUTILO

Mi ne mistajpis la titolon, la paĝo ne temas pri komputilo – sed pri korp-  
utilo; kio faras ion utilan en via korpo? Vi trovos dek sep priskribojn, la  
plimulto estas iloj ĉe via korpo. Eltrovu la 17 vortojn, kiuj respondas al  
tiuj iloj kaj helpiloj, kaj skribu iliajn komenc-literojn en la donita ordo  
en la kestojn sube. Vi malkovros kiel krei la temon de la sekva paĝo!  
Sendu la solvon por premio!

1. Maĉilo – ostoj en la suba parto de via vizaĝo, kiu ĉarniras kiel pordo.
2. Digestilo – Ege longa (sep-metra) kunfaldita tubo en via ventro.
3. Kurilo – Vi havas du. Ankaŭ: futbalilo, kaj se kune: sidigilo, lulilo.
4. Digestilo (alia) – iom poŝforma. Ankaŭ: grumblilo.
5. Beboportilo – sed nur ĉe panjoj aŭ baldaŭaj panjoj. Ankaŭ: futbalilo.
6. Korprotektilo – unu el serio de kurbaj ostoj.
7. Gratio – fingrofinajo, kiun eblas farbi. Ankaŭ: nigratabul-sonigilo.
8. Korp-atakilo – mikro-organismo kiu povas eniri vin kaj malsanigi vin; pro  
tiu danĝero gravas purigi kaj steriligi vundojn.
9. Vidilo – vi havas du ĉe via vizaĝo. Ankaŭ: amindumiloj, ploriloj.
10. Flarilo – Meze sur via vizaĝo. Ankaŭ: spirilo, ternilo, gutilo.
11. Kapo-portilo – inter ŝultroj kaj kapo. Ankaŭ: ĉemizmalpurigilo.
12. Brak-rigidigilo – unu el du ostoj en via antaŭbrako – ne la radiuso.
13. Komunikilo – Fajna fadeno kiu portas impulsojn inter cerbo kaj korpo.
14. Manĝilo – Truo en la suba parto de via vizaĝo. Ankaŭ: trinkilo, spirilo,  
parolilo, kanto, ululilo, plorilo, ridilo, tusilo, oscedilo, mordilo, kraĉilo,  
ruktilo kaj kaze de maldigesto eĉ... nu, sufiĉe pri tio.
15. Gustilo – kuŝas en la suprenomita truo. Ankaŭ: lekilo, insultilo.
16. Voĉilo – ĝi pendas kaj vibras en via gorĝo kaj ebligas al vi fari sonojn.
17. Aŭdilo – vi havas du ĉe via kapo, kun cerbo inter ili.




Kiel vi kreu la temon de la sekva paĝo?



Kion signifas la purpura koloro por vi?  
Jen kelkaj respondoj. Sendu al ni viajn!

La vorto 'purpura' venas de la Latina lingvo, sed la romianoj prenis ĝin de la grekoj. Ĝi estas la nomo de farbilo, kiun la Tirenanoj produktis el la muko de mar-konko. Ŝtofo de tiu koloro estis tiom multekosta, ke nur nobeluloj kaj reĝoj povis aĉeti ĝin. Tial ni ligas la koloron kun reĝeco kaj altranguloj.



## LA SIGNIFO DE PURPURO

Ĉinoj 500 jarojn antaŭ la nuna erao havis purpuran kolorigilon. Ili uzis ĝin por farbi iujn el la terkotaj soldatoj en la armeo trovita en la urbo Xian.

En la taja kalendaro, purpura simbolas sabaton. Ĉiu rajtas porti tiun koloron sabate. Kiu naskiĝis en sabato rajtas porti tiun koloron en ajna tago.

En Japanio ĝi estas koloro, kiu simbolas la morton. Ĝi aperas ofte en la vestaĵoj de religiaj gvidantoj. Libro de Mark Twain antaŭ centoj da jaroj notis la koloron kiel indikilon de la lasta stadio de funebrado ĉe enterigo.

Aldone al la signifoj pri reĝeco kaj nobleco, ĝi simbolas imperiismon (la romia imperio ofte uzis tiun koloron), Paskon, venenon, amikecon, dividadon, kunsentadon, saĝon kaj eĉ foje koleron.

Pro la reĝaj konektoj, verkaĵoj, kiuj estas tro ornamitaj kaj pretendemaj estas konataj kiel 'purpura prozo'.

La kantisto Princo (vidu la bildon) pleje ŝatas tiun koloron, kaj havas kromnomon 'La Purpurulo'. Li kuraĝigas al spektantoj ĉe liaj koncertoj porti ion tiukoloran. Li rolis en filmo 'Purpura Pluvo', kiu estas samtempe nomo de fama kanto lia, ke de eldonita disko kiu enhavis tiun kanton.

Ĉe la kulta televida serio *Star Trek* (Stel-Ekspedicio), la klingonoj havas purpuran sangon. En la film-serio *Star Wars* (Stel-Militoj) la sola rolulo kun purpura laserglavo estis *Mace Windu*. En la teatraĵoj pri la Esperanta spiono 005, purpuro estas la koloro de la volapukistoj (sen ajna historia pravigo!)







# Kiu aperas el la mallumo?

Jen denove litera sudoko! En ĝi estas naŭ malsamaj literoj, kiuj kune en la unua vico de la enigmo formas vorton, kiu diras al ni, kiu aperas noktomeze en la nebuloplena tombejo, kien vi erare vagis.

Ĉu vi konas la regulojn de sudoko? Ĉiu vico (horizontala strio) kaj ĉiu kolumno (vertikala strio) rajtas enhavi ĉiun literon nur unufoje. Same, ĉiu granda kvadrato devas enhavi naŭ literojn – ĉiujn malsamajn! Solvu la enigmon kaj rigardu la plej supran vicon. Tiu estas la solvo-vico. Skribu al ni ret-mesaĝon <stefan.macgill@gmail.com> aŭ leteron. Skribu kiu aperas, kaj tri-kvar frazojn kiuj informas, kiel vi reagos kiam vi vidos tion. Ni donos premiojn por la plej bonaj respondoj por ĉiu aĝo-grupo!

Solvo-  
vico →


		O	S	U	I	E		
	E		O	L	M		I	
	T	E				M	O	
	M	I		S		L	U	
	O	U				S	E	
	R		M	T	U		S	
		T	L	I	E	R		

vico →

## INSTRUISTA ENIGMO

Respondo al la enigmo  
el JA 2009-3, paĝo 11:

I	L	E	I
T	E	R	N
A	R	A	S
	N	O	T
F	A	J	R
	S		U



↑kolumno

Nia Sudoko-kontrolanto:  
Sonja MacGill

Solvo de la sudoko el JA 2009-3, paĝo 11: kie en la urbo ni estas? STACIDOME! Plena solvo en <lernu.net>. Gajnas nian premion Jindriska Drahotavá el Mladá Boleslav, Ĉeĥio.

Enigma-solvo de LUME el 2009-3 sur p 13: Ĉu aŭtuno estas trista sezono?

Respondoj al la kvinokvizio, p 6-9 de 2009-2 (vidu detale en <lernu.net>)


**1. Vera, malvera, nesciebla? (8)**

M, V, M, V, N, M, M, N, V, N

**2. Trovu sinonimojn! (9)**

Pretigu: preparu; Ne tro bona: malbrila, dub-kvalita; Saman: identan; Najbara: apuda; Gasto: vizitanto, kliento; Plado: manĝaĵo; Restoracio: manĝejo.

**3. Krucenigmo: (9)**



**4 Unu el kvar: (8)**

1 B; 2 C; 3 B; 4 A; 5 C; 6 A, 7 B, 8 Ĉ.  
Respondo: ŜAKTABULO.

**5. Miksliter' (14)**

SAKREGI = KRIEGAS; TRUPO = PORTU  
DOŝAFPLI = FIŜPLADO; JARABAN =  
NAJBARO; ORATORSCIE = RESTORACIO

Gastoj ŝatas manĝojn freŝe kuiritajn!

Solvo de la komputila krucenigmo,  
n-ro 2009-2 sur p 13



# Solvo-paĝo

Solvo de la enigmo  
en LUME, el numero  
2009-2, p 14:



P	A	N	O
A	M	U	Z
S	A	N	O
I	D	O	N

**Vortklarigoj por Rakontu al mi (p. 10-11)**

*Disputi:* vort-batali  
*Pluki ion:* forpreni ĝin el la tero.  
*Bunta:* mult-kolora

**Vortklarigoj por Legu kaj Ĝuu (p. 16-19)**

*Aŭroro:* sunleviĝo  
*Suspenco:* drameca atendo ĉe surprizo  
*Fundamento:* bazo  
*Disvolvi ion:* evoluigi, kreskigi ion  
*Establi ion:* starigi ion  
*Filiko:* verda kreskaĵo kiu reproduktas sin  
per sporoj kaj tial ne havas florojn!  
*Treti kadavron:* antaŭeniri je la kosto de aliaj  
(esprimo)  
*Degrado:* spirita malbonigo

**Kursanoj!**

## INSTRUU vian instruiston!


Jen lecion-plano, laŭ kiu vi konvinku vian  
kurs-estron aŭ gvidanton membriĝi en ILEI!

- Alt-kvalita faka revuo: IPR
- Konferencoj kaj seminarioj
- Eldonado de lerniloj kaj helpiloj
- Programo de instruista trejnado



Ankaŭ ILEI estas solvo!





# LEGU kaj ĜUU

LEGU LIBROJN – PREMIOJ – KONKURSOJ  
Iniciato de la POLA SEKCIO de ILEI



Rubrikestro: Małgosia Komamicka  
ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, Pollando.

Ĉu vi pripensis kial valoras legi librojn? Ili estas fundamento de nia civilizo.

Mi deziras veki en vi ŝaton al libroj, ĉar dank' al ili vi fariĝos sendependa de televido aŭ komputilo, sed antaŭ ĉio vi akiros scion kaj sukceson, ĉar legado estas unika investo, kiu alportos nur gajnon.

Televidaj programoj prezentas en tre mallonga tempo multajn informojn, kiuj ne ĉiam estas kompreneblaj. Spektanto ne havas tempon por klarigi dubojn aŭ pripensi aferojn. Iuj eĉ opinias, ke tro da tempo pasigita antaŭ la televida ekrano influas al hastaj decidoj kaj malpacienco. Rigardante la televidon vi nenion devas imagi, sed ĉio estas pretigita por vi.

Legante, vi mem pripensas, imagas intrigon, ĉiu detalo aspektas kiel vi volas, ĉar bona libro vigligas vian menson. Legado ne nur postulas sed samtempe instruas al vi paciencon. Ĝi disvolvas viajn lingvokapablojn, riĉigas vian vortfaradon kaj instruas vian pensadon. Kiuj ne multe aŭ preskaŭ nenion legas, tiuj balbutas, singultas, anstataŭigas vortojn per gestoj, plej ofte limigas siajn taksojn al la vortoj "super!" kaj "bone" kaj memstara pensado lacigas ilin.


La mondo de libroj formas sentemon al la beleco de vortoj kaj preparas la leganton al reala vivo. La leganto pli rapide evoluas intelekte kaj emocie. Serĉu interesajn librojn verkitajn en bela lingvaĵo, konformajn al via gusto. Libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekz. toleremon, amikecon, helpon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn kaj permesas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco.

## **KLUBO de BONA LIBRO**

Ni kreu liston de valoraj libroj. Ni rekomendu ilin unu al la alia. Ni establu Bibliotekon de Juna Amiko por junuloj kaj infanoj. Viajn proponojn, kun titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo, sendu al la adreso:

margareta.ilei.pollando@gmail.com

aldonante titolon: Biblioteko de Juna Amiko. Vidu fizikan adreson supre.



**Mia rekomendo:** Al nia Biblioteko de Juna Amiko mi proponas la fabelojn de la dano Hans Christian Andersen. Ili enhavas profundan humanisman sencion kaj universalan, supertempan valoron. Per la sorĉa mondo de bestoj, floroj, feinoj, bonaj kaj malbonaj fantomoj ili montras homajn karakterojn kaj problemojn. Kortuŝa enhavo, beleco kaj simpleco de la lingvaĵo, amo al la mondo kaj al la homoj, kompato al malfortuloj, estas proksimaj ankaŭ al nuntempaj legantoj. La fabeloj de Andersen faras la infanaĝon pli bona, pli riĉa kaj pli ĝoja. Ili ankaŭ ravas plenkreskulojn en la tuta mondo.

Kial Fingrulino ne volis fariĝi edzino de talpo? Kie Gerda retrovis sian amikon Kay? Kia estis la sorto de la malgranda marvirineto, kiu enamiĝis al homo kaj ekdeziris fariĝi homo? Kian donacon ricevadis la koboldo dum ĉiu Kristnasko? La respondojn vi trovos legante la fabelojn de Hans Ch. Andersen. Dank' al ili vi malkovros multajn sekretojn kaj ekkonos nekutimajn heroojn.

Unu el la plej belaj rememoroj de mia infanaĝo estas la momentoj pasigitaj kun mia avoĉjo, kiu rakontis, legis al mi fabelojn. Tiam mi sidadis en lia sino kaj kun suspenso postspuris la sortojn de la fabelaj herooj. Poste kiam mi jam memstare legis, mi sidis sur seĝeto, speciale konstruita por mi, tute apude al leda fotelo de mia avo, en la plej bela ĉambro de nia domo, en la biblioteko. Mi memoras kiel mi identiĝis kun la sortoj de herooj, kiel mi travivis iliajn sukcesojn kaj malsukcesojn kaj kiel forte mi volis helpi al ili kaj defendi ilin. Unu el la fabeloj, kiun rakontis al mi la avoĉjo, estis la fabelo pri la filika floro. Mi tre bone memoras ĝin, ĉar kiam mi memstare tralegis ĝin, mi konstatis, ke ĝi diferencas de la "avoĉja" versio, sed ĉi tiun version mi volus al vi prezenti.

## La floro de la filiko



La floro de la filiko estas floro, kiu ekfloras nur unufoje dum jaro, dum la Nokto de Sankta Johano, kiu estas plej mallonga nokto en jaro, inter la 21-a kaj 22-a de junio.

Ĝi donas riĉon kaj abundon. Ĉi tiu floro ne estas brila kaj ĝi disfloras kiam plukas ĝin honesta homo, do atingi ĝin estis malfacile kaj danĝere. Ĝi floras mallonge. Oni devas pluki ĝin dum aŭroro antaŭ ol la unua koko kokerikas.

Malriĉa knabo Joĉjo aŭdis la rakonton pri la filika floro kaj ekdeziris havi ĝin. Liaj gepatroj estis malsanaj kaj la gefratoj malgrandaj. Joĉjo tre amis ilin kaj li volis feliĉigi ilin. Li deziris, ke la gepatroj resaniĝu kaj en ilia domo ne plu estu malsato. Malgraŭ sia malforteco, la knabo decidis dum la Nokto de Sankta Johano serĉi la floron de filiko. Dum la vilaĝanoj amuziĝis ĉe la fajro, li ekiris en la arbaron. Li longe vagadis en la malluma arbaro kaj subite li ekvidis belan brilantan estaĵon, kiu malrapide proksimiĝadis al li. Joĉjo tre ektimis kaj retiriĝis.



Subite inter folioj de filiko li ekvidis nebrilan floron. Li etendis la manon por deŝiri ĝin kaj sammomente li aŭdis la voĉon de la brilanta estaĵo:

"La floro de filiko estas amo. Ju pli multe vi amas des pli multe vi ricevas amon. Donante feliĉon al aliaj personoj vi mem estas feliĉa."

### **KONKURSO por junaj legantoj**

La tasko estas la jena: kompletigu skribe (aŭ desegne) la finon, kian vi imagas. Aŭtoroj de la plej bonaj konkursaĵoj ricevos premion de la pola sekcio de ILEI: la libro "Reĝo Maĉjo la Unua" de Janusz Korczak, esperantigita de Tomasz Chmielik kun lia aŭtografo.

### **KONKURSO por aliaj legantoj**

Aldone al la supra tasko, atente tralegu la sekvan dialogon inter patrino kaj filo, kaj poste prenu plumon aŭ krajonon kaj plenumu la konkursan taskon.

Antaŭ kelkaj jaroj mia filo decidis interrompi la lernadon, ĉar li rimarkis, ke lia kolego estas riĉa ne lernante kaj ne laborante honeste. Mia filo konstatis, ke li nur perdas tempon lernante anstataŭ kunlabori kun sia kolego kaj rapide atingi monon. Mi provis konvinki lin kaj nun de tempo al tempo en la familia rondo ni rememoras nian iaman interparolon. Feliĉe, mia filo finis la studadon, li havas bonan laboron kaj feliĉan vivon. La vivo de lia kolego ne plu estas tiel feliĉa, li denove pasigas tempon en malliberejo...

### **DIALOGO inter patrino kaj filo**

**Junulo:** Ĉu vi kredas je bono?

**Patrino:** Jes. Mi senhezite kredas je bono.

**Junulo:** Ĉu boneco? Kio estas tio?

**Patrino:** Boneco estas la maniero ami homojn, eble pli ol ili meritas... Indas fari bonon.


**Junulo:** Sed ja estas pli facile fari malbonon ol bonon. La homoj ŝatas iluziojn. Ili aspiras al riĉo, ili malamas, ili...

**Patrino:** Nur bono kontentigas niajn aspirojn. Ja difekta aŭto neniun ĝojigas, simile, malbonvola homo ne povas doni amon.

**Junulo:** Prefere konfesu, ke la nuntempa sistemo de valoroj kaj principoj kondukas al morala falo kaj al vulgareco. La homo perdis ian sistemon de valoroj pro la blindiĝo per fanatika espero al rapida riĉigo.

**Patrino:** Jes. Tio estas vero... Sed mi kredas je digno kaj humaneco. Mi kredas, ke homo scipovas distingi bonon de malbono.

**Junulo:** Ho jes. La homoj scipovas distingi bonon de malbono, sed laŭ propraj principoj. Ili estas pli mallaboremaj kaj volas atingi monon rapide kaj nehoneste.



**Patrino:** Tio pasos. Nur laboro kaj vera estimo por laboro donas veran feliĉon.

**Junulo:** Nuntempe tiu sinteno estas malofta fenomeno. La homoj strebas al kariero kvazaŭ „tretante kadavrojn”, ili senskrupule profitcele uzas la aliajn. Malmultaj jam opinias, ke ĉion oni povas perlabori per siaj manoj. Eĉ plie, malmultaj jam ne scipovas esti dankaj pro tio, kion ili ricevis aŭ ricevas.

**Patrino:** Homo eraras, sed li post unu momento retrovas senton de justeco. Li komencas vivi laŭ moralaj kaj etikaj normoj. Esti bona signifas esti danka.

**Junulo:** La mondo estas tiel malbona. Ja, pli bone esti malbona homo ol bona.

**Patrino:** Nur boneco, kaj do amo scipovas konservi humanecon en la homo, do doni al li feliĉon. Ĉiu, havante en si mem humanecon scipovas persisti eĉ en la plej malfacilaj tempoj. Degrado de valorstemo estas fonto de homaj malfeliĉoj.

**Junulo:** He, vi ankoraŭ konvinku min... Mi ege ŝatus esti riĉa, bonstata... Tiam mi ankaŭ povus dividi mian havaĵojn kun vi.

**Patrino:** Facile oni dividas tion, kion oni havas multe, sufiĉe, abunde. Malpli facile oni dividas tion, kio al ni mankas kaj se oni nenion atendas reciproke.

**Junulo:** Vi pentras iluzion. Tiu mondo estas utopio. La homoj estas tro oportunismaj kaj absolute ne volantaj dediĉi sin al aliaj. Do ne estas espero, ke la mondo estu tia.

**Patrino:** Ĉiam estas ESPERO. KREDU je amo. La amo estas potenco, tial bono ĉiam venkas malbonon.

Karaj legantoj, ĉiu el vi certe travivis momentojn de malforteco kaj certe venkis ilin dank' al interparolado kun la gepatroj, geavoj, geonkloj ... Bonvolu priskribi vian dialogon. La plej valorajn dialogojn **premios** la pola sekcio de ILEI per la jam menciita libro, same aŭtografita de la tradukinto. Sendu ĝis julio 31, 2010.

Finante la rubrikon mi enmetas la belan poemon de Julian Tuwin:

## OKULVITROJ


Kuras, krias Hilario  
serĉas siajn okulvitrojn.  
Serĉas li en pantalono  
kaj en ŝuoj, en kalsono,  
vestojn siajn palpas, ŝovas,  
miksas ĉion - kaj ne trovas.  
"Ho skandalo! Iu tipo  
ŝtelis miajn okulvitrojn"

Sub kanapo, sur kanapo  
serĉas li kun spiro-halto,



ankaŭ en kameno, forno,  
musa truo ĉe la pordo.

Jam la plankon li forŝiras,  
jam policon li venigas,  
ekrigardas li spegulon...  
kaj ne kredas - tiu ulo...  
Ili estas. Mirindaĵo!  
Jes, sur lia propra nazo.



(esperantigis: Danuta Kowalska)



# KVINO KVIZO

Stefan MacGill (teksto kaj kvizo)  
Karina MacGill (bildo kaj erco)

**Legu la rakonton,  
(eventuale kovru la tekston)  
kaj respondu la kvin kvizo-  
demandojn. Kontrolu viajn  
respondojn kaj kalkulu viajn  
poentojn!**

## Persista kuniklo demandadas

**K**uniklo venas al eta butiko en la urbo, rigardas en la vitrino, poste eniras kaj demandas: "Ĉu vi havas karotojn?"

"Ne, kunikleto, ni ne havas karotojn." respondas la butikisto.

"Certe?" persiste obstinas la kuniklo.

"Certe!"

Do, la kuniklo turniĝas kaj forlasas la butikon kaj promene reiras al la kampo kie ĝi loĝas.

**L**a postan tagon, la kuniklo denove paŝas al la butiko kaj eniras ĝin. La butikisto memoras la kuniklon, do li diras: "Saluton, kunikleto, bela vetero, ĉu ne? Kion vi deziras aĉeti?"

"Saluton butikisto, jes, bela vetero. Mi deziras aĉeti karotojn."

"Sed, kuniklo, mi jam hieraŭ diris al vi ke mi ne havas karotojn."

"Bedaŭrinde." diras la kuniklo; ĝi turniĝas kaj forlasas la butikon kaj iras hejmen al la kuniklaro en la kamparo.

**A**nkaŭ la postan tagon, denove aperas la kuniklo en la butiko.

"Saluton, kunikleto! Malbela vetero, ĉu ne?" diras la butikisto.

"Ĝuste, terura vetero" respondas la kuniklo, kun akvo gutanta de la oreloj sur la servo-tablon: "Diru, ĉu vi havas karotojn?"

"Ne! Mi ne havas karotojn, kaj mi ne *havos* karotojn." iom kolere respondas la butikisto. Do, la kuniklo turniĝas kaj foriras de la butiko, lasante kotajn piedspurojn sur la ĵus purigita planko.

**S**ekvatage, kio okazas? Jen la kuniklo denove. Almenaŭ tiutage ne pluvas. Do, li paŝas en la butikon kaj demandas: "Ĉu vi havas karotojn?"

"Ne, mi ne havas karotojn, kaj mi nenie, neniel, nenial kaj neniam

havos karotojn!" respondis laŭte kaj kolere la butikisto.  
La kuniklo turniĝas kaj foriras, same kiel en la antaŭaj tagoj.

**I**magu, la sekva tago estas dimanĉo kaj la butikisto estas fermita.

**K**redu aŭ ne, en la sekva tago, lundo, aperas denove tiu sama kuniklo, kun la sama demando:

"Ĉu vi havas karotojn?"

Nun la butikisto estas kolerega. Li eksplodas: "Impertinenta kuniklo, neniel mi iam ajn havos karotojn. Kial vi ĉiutage insistas? Kial vi ne uzas viajn orelojn kaj aŭskultas min? Se vi unufoje denove aperos ĉi tie kaj starigos tiun saman demandon, mi gluos vin al la muro! Foriru!"

Do, la kuniklo foriras.


**E**n la sama horo en la tuj sekva tago — neniu alia ol tiu sama kuniklo proksimiĝas. La butikisto estas jam tute furioza kiam li envenas:

"Kion vi volas demandi hodiaŭ, kuniklaĉo?"

"Sinjoro butikisto, ĉu vi havas gluon?"

"Ne!" respondas la butikisto.

"Sinjoro butikisto, ĉu vi havas karotojn?"



**1** Tasko unu: via sumo el dek poentoj:

*Ĉu la frazo estas vera, malvera, aŭ ĉu ne eblas, el la rakonto, decidi?*

1. La butikisto estas virino.
2. La kuniklo revenas kvarfoje.
3. La butikisto estas malgranda.



4. La kuniklo loĝas tre proksime al la butikoj.
5. La kuniklo loĝas en kampo.
6. La butikisto kelkfoje havas karotojn.
7. La butikisto jam komplete forgesis la kuniklon kiam ĝi revenas la duan fojon.
8. La butikisto estis tute kolerega kiam revenis la kuniklo por la tria fojo.
9. La butikoj vendas aliajn legomojn, sed ne karotojn.
10. La butikisto purigis la plankon tuj antaŭ la alveno de la kuniklo en la malbon-vetera tago.



**2** Tasko du: via sumo el ok poentoj:

*Jen difinoj por ok vortoj en la rakonto. Trovu la vortojn kaj skribu iliajn komencliterojn en la kestoj apude por trovi per vertikala legado, kia estas la definitiva kaj kolosa koler-eksplodo de la butikisto:*

- Ne ĉesi lukti por ricevi ion, kion oni deziras. (ok literoj)
- Doni informojn reage al demando. (ok literoj)
- Malhelpeme, malbonvole. (sep literoj)
- Mikso de tero kaj akvo. Malpuraĵo. (kvar literoj)
- La loko en butikoj kie klientoj metas siajn aĉetaĵojn. (5+5 literoj)
- Malafabla, malĝentila, aŭdaca, insista. (dek du literoj)
- Ne forgesi. Teni en la kapo. (ses literoj)
- Fariĝi videbla. ( kvin literoj)

### 3 Tasko tri: via sumo el naŭ poentoj:

*Jen sep frazoj. Sep frazoj rilatas al la sep tagoj, kiuj pasas en la rakonto, kaj unu frazo rilatas al ses el tiuj tagoj. Ligu la frazojn kun la tagoj.*

1. Tago unu      **A:** La butikisto diras, ke li neniam havos karotojn.
2. Tago du      **B:** La unua demando de la kuniklo ne rilatas al karoto.
3. Tago tri      **C:** Estas bela vetero, kaj la kuniklo revenas.
4. Tago kvar      **Ĉ:** La butikisto eksplodas je kolero.
5. Tago kvin      **D:** La kuniklo rigardas en la vitrino de la butiklo.
6. Tago ses      **E:** La kuniklo venas al la butiklo kaj eniras ĝin.
7. Tago sep      **F:** La kuniklo kaj la butikisto ne vidas unu la alian.
8. En 6 tagoj      **G:** La kuniklo lasas kotajn spurojn sur la planko.

*Donu al vi mem plusan poenton kaj grandan donacon (kilogramon da karotoj, ekzemple), se vi sukcesas diri en kiu tago de la semajno la kuniklo unuafoje iras al la butiklo!*

### 4 Tasko tri: via sumo el ok poentoj:

*Kiu respondo el la kvar estas ĝusta? La frazo estu ĝusta kaj gramatike, kaj laŭ la teksto de la rakonto!*

1. \_\_\_\_\_ tiutage ne pluvas.  
A: Almenaŭ    B: Apenaŭ    C: Ankoraŭ    Ĉ: Ankaŭ
2. Neniu maniere la butikisto havos karotojn: li \_\_\_\_\_ havos ilin.  
A: nenial    B: nenie    C: neniel    Ĉ: neniam
3. La kuniklo foriras \_\_\_\_\_ kotajn piedspurojn  
A: lasate    B: lasante    C: lasite    Ĉ: lasonte
4. Sekvatage \_\_\_\_\_ okazas?  
A: kiu    B: kion    C: kiu    Ĉ: kio



5. La kuniklo foriras, same \_\_\_\_\_ en la antaŭaj tagoj  
 A: kiel            B: kial            C: kiam            Ĉ: karaoke
6. En la lasta tago, la kuniklo proksim\_\_\_\_\_ al la butikoj.  
 A: as            B: igas            C: iĝas            Ĉ: umas
7. En la \_\_\_\_\_ aperas la \_\_\_\_\_.  
 A: sekva tago - kuniklon            B: sekva tago - kuniklo  
 C: sekvan tagon - kuniklon            Ĉ: sekvan tagon - kuniklo
8. La kuniklo ...  
 A: turnas kaj foriras.            B: turnigas kaj foriras.  
 C: turniĝas kaj foriras.            Ĉ: paŝas inverse por eliri.

## 5 Tasko kvin: via sumo el dek kvin poentoj:

*Jen tridek tri vortoj el la rakonto, kiujn vi devas eltrovi. Ni donas difinon, kaj frazon el aŭ pri la rakonto, kiu uzas la vorton. Skribu la komenc-literojn en la kestojn kaj legu vertikale la moralon de la rakonto. Ricevu duonan poenton por ĉiu ĝusta respondo, ĝis maksimumo de 15.*

- En neniu tempo: "Mi \_\_\_\_\_ havas karotojn en mia butikoj!"
- Malgranda: 'Kuniklo venas al \_\_\_\_\_ butikoj en la urbo.'
- Volas: "Kion vi \_\_\_\_\_ aĉeti?"
- Movas sin direkte al io: 'La kuniklo forlasas la butikojn kaj \_\_\_\_\_ hejmen.'
- Reagas al demando: "Ne, ni ne havas karotojn." \_\_\_\_\_ la butikisto.
- En sola okazo: "Se vi \_\_\_\_\_ denove aperos ĉi tie..."
- Aĉa, neplaĉa: "Saluton, kuniklo! \_\_\_\_\_ vetero, ĉu ne?"
- Aŭdaca, malĝentila : " \_\_\_\_\_ kuniklo, neniel mi iam ajn havos karotojn."
- En ĉi tiu momento: ' \_\_\_\_\_ la butikisto estas kolerega.'
- Minimume: ' \_\_\_\_\_ tiutage ne pluvas.'
- Sendube: " \_\_\_\_\_?" persiste obstinas la kuniklo.
- Aŭskultiloj: '...kun akvo gutanta de la \_\_\_\_\_ sur la servo-tablon.'
- En neniu loko: 'Mi havas karotojn \_\_\_\_\_ en mia butikoj!'

- Forte malkontenta: 'Nun la butikisto estas \_\_\_\_\_, Li eksplodas.'
- Je iu tempo: 'Neniel mi \_\_\_\_\_ ajn havos karotojn.'
- Loko, kie vivas multaj homoj: 'Kuniklo venas al eta butikio en la \_\_\_\_\_.'
- Nula kvanto de iuj: '\_\_\_\_\_ alia ol tiu sama kuniklo proksimiĝas.'
- Atmosferaj kondiĉoj: "Saluton, kunikleto, bela \_\_\_\_\_, ĉu ne?"
- Postuladas: "Neniel mi havos karotojn. Kial vi ĉiutage \_\_\_\_\_?"
- Por neniu kialo: "Mi \_\_\_\_\_ havos karotojn en mia butikio."
- Movas sin de ekstere internen: 'La kuniklo \_\_\_\_\_ la butikon.'
- Domparto sur kiu oni paŝas: '...piedspurojn sur la ĵus purigita \_\_\_\_\_.'
- Ekestas, eventumas: 'Sekvatage, kio \_\_\_\_\_? Jen la kuniklo denove.'
- Montro-fenestro: 'Kuniklo alvenas kaj rigardas en la \_\_\_\_\_.'
- Ekvidiĝi: 'La postan tagon, denove \_\_\_\_\_ la kuniklo.'
- Posta: 'Kredu aŭ ne, en la \_\_\_\_\_ tago, aperas denove la kuniklo.'
- Venas de fora loko al apuda: '...neniu alia ol tiu sama kuniklo \_\_\_\_\_.'
- Postrestigante: 'Li foriras de la butikio, \_\_\_\_\_ kotajn piedspurojn...'
- Similas al vulkano: 'Nun la butikisto estas kolerega. Li \_\_\_\_\_.'
- En neniu maniero: "Aĉa kuniklo. \_\_\_\_\_ mi havos karotojn."
- Utiligas: "Kial vi ne \_\_\_\_\_ viajn orelojn kaj aŭskultas min?"
- Vertikala surfaco de konstruaĵo: "...mi gluos vin al la \_\_\_\_\_!"
- 'La kuniklo kaj la butikisto komence estis afablaj. \_\_\_\_ ĝentile kondukis.'

=====

*La ĝustaj respondoj aperos en numero 2010-2 de nia revuo. Se vi estas senpacienca, rigardu pli frue en [www.lernu.net](http://www.lernu.net). Iru al la biblioteko kaj elektu la ligan al Juna amiko. Vi trovos ekde junio 2010 la respondojn. Via rezulto:*

$$\boxed{\phantom{00}} + \boxed{\phantom{00}} + \boxed{\phantom{00}} + \boxed{\phantom{00}} + \boxed{\phantom{00}} = \boxed{\phantom{00}} \times 2 = \boxed{\phantom{00}} \%$$

el 10    el 8    el 9    el 8    el 15    el 50    duobligu tion por procentaĵo!





# DIVENU !

Kiuj vortoj estas kaŝitaj?

1



2

iv

3




4

$\frac{l}{2}$

5


bb

6



7

k



8



9

vi://

10


””

Kiel li nomiĝas?

11



12



r

Ne perdu la esperon! Provu denove kaj denove!

(Solvaj sur paĝo 27)



# humuro

de Imre Szabó (Hungario) kaj  
Jadranka Mirić (Serbio)

– Mi vidas, ke via glaso estas malplena.  
Ĉu vi petas ankoraŭ unu?  
– Ba, tute ne! Kion mi komencu kun du  
glasoj malplenaj?

– *Kiom da ŝafoj vi havas? –  
demandas raportisto la paŝt-  
iston.*

– 5213!

– *Ho, terure multe! Nepre vi  
havas propran, specialan tru-  
kon por nombri ilin, ĉu?*

– *Evidente, mi havas. Mi nom-  
bras la kruojn kaj dividas ilin  
per kvar.*

Iu demandas la direk-  
toron de firmao:

„Diru al mi, kiom mi  
povas perlabori ĉe vi?”

„Komence 200 eŭrojn,  
poste 500!”, diras la di-  
rektor.

„Bone, mi revenos  
poste!”



Interparolas du polic-  
istoj.

„Kie vi naskiĝis?”

„En nia domo. Kaj vi?”

„En hospitalo.”

„Kial? Kio okazis al vi?”

– Pardonu min, ĉu mi povus surprovi tiun robon  
en la monstro-fenestro?

– Kara sinjorino, sed ni havas eĉ prov-budon.

„Mi volas legi ian streĉan krim-romanon”  
– esprimas viro sian deziron en biblioteko.

„Jen, prenu ĉi tiun. Ĝis la fino de la lib-  
ro vi ne scios, ke la ĝardenisto estas la  
murdinto” – diras la bibliotekisto.

1. neĝo 2. trovi 3. bombono  
4. surdulo 5. duboj 6. mateno  
7. kolibro 8. Kolomano 9. revii  
10. komparo 11. kompoto 12.  
koridoro





# InterKultura Mondo

www.interkulturo.net

Rubrikestro: *Elena Nadikova, Rusio*

lena\_espero@mail.ru

Saluton, karaj legantoj!

Nia rubriko jam antaŭe rakontis pri diversaj projektoj, aranĝoj enkadre de edukaj kaj kulturaj programoj de Eŭropa Unio. Ĉi-numere ni daŭrigos la temon kaj konatigos al vi Esperanto-klubon el Pollando, el la urbo Gubin. La klubo nomiĝas “*Verdaj Papilietoj*” kaj ĝi partoprenis en la projekto AKEL. *Juna Amiko* jam prezentis iomete polajn infanojn (vidu n-ron 3/2008). Nun ni volas konatigi al la legantoj la klubon pli proksime.

“Verdaj Papilietoj” ekzistas pli ol 6 jarojn en Elementa Lernejo № 2 en Gubin. Ĉiu-taga vivo de la klubanoj: ili lernas en la lernejo, diligente alproprigas diversajn lern-objektojn. Dum libera tempo ili ludas, desegnas, kantas, sportumas kaj, certe, lernas Esperanton. Jen kelkaj el iliaj reagoj pri la Internacia lingvo. **Magda:** “*Tre plaĉas al mi Esperanto kaj mi volas lerni ĝin*”. **Ala:** “*Ĝojas mi, ke mi povas lerni Esperanton*”.

Papilietoj partoprenas en la klubo 1-2 jarojn (dume ili lernas en la Elementa Lernejo), sed ilia “Esperanto-vivo” estas varia kaj interesa. Ili korespondas kun infanoj el diversaj landoj, partoprenas en multaj E-aranĝoj. Ekzemple, en diversaj konkursoj. Granda ĝojo de la klubo estis venko en Tutmonda Esperanta Fabel-konkurso en 2008: tri individuaj premioj kaj unu grupa. “Komuna” fabelo nomiĝis *Papilietino Verda* – preskaŭ kiel la grupo mem!

Polaj papilietoj ŝatas ankaŭ desegni. En la internacia konkurso de infan-desegnaĵoj, kiun organizis *Esperanto en Vendomois* (Francio) kun la temo “Vojaĝi...” la lernejo ricevis “*Kuraĝigan premion*” kaj tri lernantinoj: *Justyna, Paulina* kaj *Kasia* – partopreno-atestojn. En alia desegnokonkurso “*Abio de Espero*”, ankaŭ en Francio, du desegnoj de papilietoj estis



premiitaj. Paulina Kłos ricevis premion pro sia laboro „Kortuŝa“. Sur ŝia desegno estis malsana knabino en hospitalo kun panjo, kiu staris apud la lito kaj tenis la manon de sia filineto. *Agata Czacharska* ricevis premion pro sia laboro „*Pri espero*“. Ŝi desegnis sur la kristnaska abio brilan bombeton, en kiu reflektiĝas du kunigitaj manoj.

*Verdaj Papilietoj* partoprenas ankaŭ en diversaj grupoj – helpe de Esperanto. Ekzemple, en kompanioj *Purigu la mondon*, *Plantu arbon*. En aprilo 2008 la geknaboj kolektis monon por fariĝi patronoj de 3 arboj en Brazilo. Tiuj arboj ricevos iliajn nomojn. Tiamaniere papilietoj helpas ankaŭ al la bieno-lernejo „*Bona Espero*“, kiu daŭre zorgas pri arboj. Dum Eŭropa Tago de Lingvoj *Verdaj Papilietoj* kantas Esperante por plia disvastigo de la Internacia Lingvo. Gratulojn al la junaj esperantistoj!

*Verdaj Papilietoj* havas amikojn en diversaj mondopartoj. Ili gastigas esperantistojn el Germanio kaj Britio, estas amikoj de samideanoj el Brazilo, Hungario, Francio kaj Japanio. Sed, sendube, la plej “interkultura” aranĝo por la klubo iĝis partoprenado en FRINGOJ 2008. 13 gelernantoj el *Verdaj Papilietoj* partoprenis en *FRI-NGOJ (Festa Renkonto Internacia de Geknaboj)*. Estis bela printempo, en malnova kastelo Grésillon en Francio (kun fantomo, kompreneble), amikemaj polaj kaj francaj infanoj kaj neforgesebla, mirinda etoso!



29 infanoj havis okazon por kontroli, ĉu ili jam konas Esperanton por paroli kun aliaj. Ĉiuj asertas, ke Esperanto estas facila, sed oni devas koni multe da vortoj por paroli dum semajno! Ekzerco faras majstron!

Ĉiuj infanoj kune kantis, promenadis en la Grezijona parko, muzikis,

**Vizitu la hejmpaĝon Interkulturo! Vizitu la kvizojn, la forumon, ktp. Anoncu vian grupon. Komparu vian vivon kaj ŝatojn kun tiuj de aliaj grupoj en aliaj landoj kaj kulturoj. Malkovru la diferencojn inter vi, kaj trovu ankaŭ tion, kio estas inter vi komuna!**

[www.interkulturo.net](http://www.interkulturo.net)



ludis, dancis, ĵonglis, desegnis (ekzemple, laŭ la temo “*Estu sana*”). Kun plezuro la partoprenantoj preparis magiaĵojn, faris recikligitajn paperojn (ĉiuj havas sian propran leter-paperon por memoro!), turno-brilojn, teatrumis... Verdaj papilietoj kun 3 gefrancoj preparis teatraĵon *La krakova drako* laŭ pola legendo.



Iun tagon ĉiuj partoprenis en interesa vojaĝo al Kamparo de Trogloditoj en Rochemenier. Neforges-eble!

Interalie, por la polaj gastetoj plaĉis franca manĝaĵo, tre bongusta, kvankam iom alia ol pola. Unue ili scivoleme taksis per okuloj, poste gustumis. Nun ankaŭ hejme ili volonte manĝas ekzemple mar-fruktojn.

La lasta tago estis malfermita ankaŭ al ekstera publiko. La invito aperis en franca gazeto. Okazis granda festo kun spektaklo, ekspozicio de laboraĵoj kaj prezentado, kiun ili ĉiuj komune preparis. Al la gastoj ĉio tre plaĉis kaj ili laŭte aplaŭdis!



En amika, internacia etoso rapide pasis la tagoj. Fine estis reciprokaj invitoj kaj sinceraj larmoj de adiaŭo. Kaj decido, ke **Esperanto estas tre grava** kaj oni devas diligente lerni ĝin! Poste *Kacper*, unu el polaj knaboj, diris: “*Mi ne suspektis, ke oni povas dum kelkaj tagoj tiel forte ekŝati la aliajn kaj fariĝi amikoj ...* “. Nun ili komprenas kaj enuas pro manko de tiuj amikoj... Ne nur ili, aldonas nia rubriko. Ĉiu, kiu almenaŭ nur unufoje partoprenis en E-aranĝo, sentas la samon. ***Esperanto malfermas MONDON! Kaj ĉiu nova jaro pruvu pli kaj pli tiun veron!***

*Nia rubriko esprimas koran dankon al Krystyna Worobiej, la gvidantino de “Verdaj Papilietoj”, pro la disponigitaj materialoj kaj deziras pluajn sukcesojn al ŝia nobla laboro!*

---

*fantomo*: reaperanta mortinto / *kompanio*: organizaĵo kun speciala celo / *magio*: ago per supernatura forto / *papilio*: insekto kun grandaj flugiloj / *patrono*: subtenanto / *projekto*: plano efektivigota

# Changó, reĝo de Oĝó

## Afrik-kuba legendo

Oni rakontas, ke antaŭ longa tempo, en la lando de Orulo<sup>1</sup>, la homoj komencis malsati kaj morti pro senpluva vetero. Tiam Orulo alvokis la plej fortajn heroojn de sia lando: Ĉangó<sup>2</sup>, Ogún<sup>3</sup> kaj Oĉosi<sup>4</sup>.

„Necesas, ke vi iru ĉasi ion; vi povas fari tion, ĉar vi estas junaj kaj fortaj.” Kaj al la Orula voĉo, kiu sonis tra la lando ili tuj obeis kaj iris al la montaro.

La unua bon-sortulo estis Ogún, kiu ĉasis kapron, sed...

„Neniu scios ke mi manĝis ĝin”, pensis li kaj komencis manĝi la bongustan vian-don de la kapro.

Ankaŭ Oĉosi akiris ĉasaĵon: bongustan ĥution, kiun li rapide rapide forvoris. „Ho, kian malsaton mi havis”, diris li.

Dume, Ĉangó trovis ovojn en nesto kaj pensis: „Mi manĝos kelkajn ovojn por postvivi, sed la aliajn ovojn mi portos al Orulo.”

Post iom da tempo oni aŭdis la voĉon de Orulo tra la montaro: „Ĉangó, Ogún, Oĝoĉi venu ĉi tien!”

La tri fortuloj rapide prezentis sin antaŭ Orulo. Tiu diris:

„Vi restis longe en la montaro. Vi

devas veni kun bona ĉasaĵo. Kion vi alportas, Ogún?”

„Nenion, Orulo. Mi nenion povis trovi tie.”

„Kaj kion vi alportas, ĉasisto Oĉosi?”

„Nenion, Orulo. Mi portas nur teron sur miaj piedoj.”

„Kaj kion vi alportas, Ĉangó?”

„Nur tiujn ĉi malgrandajn ovojn.

Sed mi devis manĝi la ceterajn ovojn por povi postvivi kaj daŭrigi la ĉasadon.”

Sed Orulo estas tre saĝa kaj kapabla

divenulo. Li

rigardis ilin tre atente kaj pensis: Ogún kaj Oĉosi estas tre dikaj; ili manĝis ion kaj mensogas. Nur Ĉangó diras la veron.

Tiam Orulo diris al Ogún kaj Oĉosi:

„Jen, mensoguloj. For de ĉi tie! Mi ne volas vidi vin dum longa tempo. Nur post kiam vi lernis tiun lecionon, vi povos reveni.” Poste li turnis sin al Ĉangó kaj diris al li: „Vi estos la reĝo de Oĝó, mi promesas tion al vi.”





# STELULOJ

## KUBO

### DE MALGRANDAJ POPOLOJ

#### **Nicolás Guillén\***

*Nicolás Guillén*, ankaŭ nomata la poeto negra, naskiĝis en la orienta urbo *Camagüey* [kamaŝej] la 10an de julio 1902. Li lernis en diversaj lernejoj de sia naskiĝurbo inter 1908 kaj 1912. En 1920 li sukcese trapasis la bakalaŭran ekzamenon kaj komencis studi juron en la universitato de Havano, sed post semajno li devis ĝin forlasi pro manko de mono.

En 1922 li verkis sian unuan poemaron. Fine de 1928 li komencis labori en Havano. Li laboris ĉe pluraj gazetoj: *Informo*, *La Frenezulo* (humura semajna gazeto), *Mediodía* (*Tagmezo*). En 1929 aperis liaj sonetoj, per kiuj li konatiĝis al la publiko. La jaro 1930 markis la aperon de lia poste fama poem-libro *Motivoj de soneo*, kies titolo devenas el soneo: muzika ĝenro, evoluinta dum la 20aj jaroj de la pasinta jarcento, atinginta sian apogon en la 30aj jaroj, kiam aktivis jam pluraj komponistoj kun originalaj, tre popularaj muzikaĵoj. Ekde 1937 Guillén estis membro de la komunista partio. Li partoprenis en la Kongreso de Verkistoj kaj Artistoj de Meksiko kaj en la dua internacia Kongreso de Verkistoj por Defendo de la Kulturo en Barcelono, Valencio kaj Madrido.

En 1938 li revenis al Kubo kaj komencis kunlabori ĉe la nove fondita la-

laborista gazeto *Hoy* [oj] (*Hodiaŭ*). En 1942 li vojaĝis al Haitio kun politika kaj kultura misio. En la jaro 1945 li vojaĝis al Karakaso, la ĉefurbo de Venezuelo. Tie li prelegis en la ĉefa universitato kaj oni elektis lin honora membro de la Asocio de Venezuelaj Verkistoj. Li vojaĝis ankaŭ al Kolumbio, Peruo, Ĉilio, Argentino, Urugvajo kaj Brazilo. En 1949 li iris al Novjorko kiel membro de la Kuba delegacio de Scienca kaj Kultura Konferenco por la Monda Paco. Post kvar jaroj li vojaĝis al Ĉilio por partopreni en la Kontinenta Kongreso de Kulturo, de kie li ne povis reveni al Kubo pro la subprema reĝimo de Batista (1952-58). Li faris vizitojn al diversaj Amerikaj kaj Eŭropaj landoj. De 1955 ĝis 1958 li loĝis en Parizo, de kie li transloĝiĝis al Argentino. Tie li legis siajn poemojn en la radio, kaj deklamis ilin en diversaj kulturaj institucioj de la Argentina ĉefurbo Bonaero kaj en diversaj provincoj.

Post la venko de la Kuba revolucio, en 1959 Guillén – post pluraj jaroj da ekzilo – revenis al Kubo. Li rekomencis sian kunlaboron ĉe la gazeto *Hoy*, akceptis multajn prelegojn, en Havano kaj en diversaj provincoj de Kubo. En la jaroj 1959-60 li denove vojaĝadis en politika kaj kultura misioj. En 1961



li fariĝis membro de la Nacia Konsilantaro pri Kulturo kaj estiĝis prezidanto de la Unuiĝo de Kubaj Verkistoj kaj Artistoj (UNEAC). En diversaj eksterlandaj politikaj kaj kulturaj aranĝoj li reprezentis la Kubajn intelektulojn ĝis sia morto, la 16-an de julio 1989.

En la jaro 1979 (Internacia Jaro de Infanoj) la kubanoj entuziasme akceptis la ĵus aperintan libron de Nicolás

Guillén „*Tra la Antila Maro naĝas papersipo*”, lia unua kaj sola libro dediĉita al infanoj. La verko havas 34 poemojn (prezentitaj en du cikloj), kiuj enhavas enigmojn, kanzonojn, karib-dancajn tekstojn kaj fablojn. *Tra la Antila Maro* estas poemaro, kiu kapablas atingi ĉiujn, de la plej postul-emaj ĝis la plej naivaj. Nur tre malmultaj povas atingi tion en arto.

### Divenu!

Miloj da soldatetoj  
iras kune al milito  
ĉiuj ĵetas siajn lancojn  
kiuj pike falas teren.

(*Solvo: pluvo*)

Kvankam ŝajnas strange  
Certas, ke tiu sinjoro  
per sia kapo frapegas  
kaj ne sentas doloron.

(*Solvo: martelo*)

Elhispanigita de  
*Jozefo de Jesús Campos Pacheco*

\* Elparolu: *Nikola Gijen*

---

### *Fino de Changó... (p.31)*

Kaj tiel Orulo premiis Ĉangó-n pro lia honesteco. Laŭ la legendo Ĉangó estis la plej bona reĝo de Oĝó, legenda urbo de Afriko.

Elhispanigita de *Jozefo de Jesús Campos Pacheco*, Kubo

<sup>1</sup> En la afrik-kuba mitologio Orulo estas potenca dio, majstro de divenado.

<sup>2</sup> En la afrik-kuba mitologio Ĉangó estas filo de Jemajá kaj la dio de la militistoj.

<sup>3</sup> En la afrik-kuba mitologio Oĝún estas granda kaj forta militisto.

<sup>4</sup> Laŭ la afrik-kuba mitologio Oĉosi estas forta ĉasisto kaj bela dancisto, kiu vekas amon.



*En tiu ĉi rubriko vi trovas bildojn el la Esperanta literaturo heredaĵo dank' al la plumo de nia fidela amiko, elstara islanda poeto, Baldur RAGNARSSON. Konsciu, ke sen bazaj scioj pri nia historio kaj literaturo oni ne povas fariĝi cel-konscia esperantisto, sukcesa pledanto por nia nobla ideo. (Red.)*

**28** *Eli URBANOVÁ*

En *Esperanta Antologio, poemoj 1887-1981* (2a eldono 1984), kiun redaktis

William Auld, estas aperigitaj poemoj de 22 virinoj, ne granda proporcio de la tuto de 163 poetoj. Dek du el tiuj poetinoj aperigis apartajn poemarojn. Pri tri el tiuj poetinoj, Marjorie Boulton, Hil-

da Dresen kaj Clelia Conterno-Guglielminetti, jam aperis artikoloj en la literaturaj *Bildoj de Juna amiko*. Mi nun aldonas la kvaran, pri la ĉeĥa poetino *Eli Urbanová*. Komuna en la poezio de tiuj kvar poetinoj estas evidenta tendenco al emocia esprimado pli ol ĝenerale ĉe la viraj poetoj, tamen kun diferenco. Ĉe Marjorie tiu tendenco intime ligiĝas al vastetenda humanismo, ĉe Hilda al la naturo, ĉe Clelia al cirkonstancoj ofte nuancitaj de sentoj de tragiko. Eli Urbanová estas la plej emocie dediĉita el tiuj kvar poetinoj, kaj ŝia intime persona sentosfero trovas esprimadon en rekta, sendevia maniero sen tendenco al ĉirkaŭfrazaj meditoj.

*Eli Urbanová* (1922-) aperigis sian unuan poemaron en sia gepatra ling-

vo, la ĉeĥa, nur 18-jara, en 1940. Ŝi lernis Esperanton ok jarojn poste kaj

# BILDOJ EL LA HISTORIO

baldaŭ komencis eksperimenti per tiu nova lingvo en verkado de poemoj, kiuj aperis en revuoj. En 1960 aperis ŝia unua poemaro en Esperanto, *Nur tri koloroj*, ĉe la eldonejo Stafeto. Kvantkam pliaj poemaroj aperis dise tra la jaroj, estas tiu ŝia unua poemaro, kiu plej intime ligiĝas al la reputacio de Eli Urbanová kiel poetino. Tiu poemaro daŭre konservas sian freŝan voĉon post kvindek jaroj. La unua poemaro klarigas pri kiuj tri koloroj temas:

*Dum la ceteraj sin koncentris  
por miksi farbon kun la farbo,  
mi micajn bildojn simple pentris;  
ja mi surmetis per la karbo  
nigretan, nigran kaj nigregan.*

Ŝi daŭrigas emfazi tiun sian elekton de simbolaj koloroj: "kreante scenojn fan-



taziajn / mi ĉiam ree uzi lernis / nur tri kolorojn kaj ne pliajn". En poemo, titolita *Konfeso*, ŝi diras:

*Ne, mi ne havas multajn sciojn:  
jen kion mi neglektis,  
dum febre mi kolektis  
impresojn, emociojn.*

Specimenojn el tiu kolekto la poetino montras al la leganto, ja ofte melankolie nuancitajn de la tri koloroj, sed ne

*Post la plorkonsol'la raci' admonas,  
Sciu do, amant', ke mi vin pardonas,  
ĉar ne tuŝas ja kia ajn plezuro  
bildon sur la mur.*

La temoj de *Nur kvin kolorojn* tamen ne estas sole la amo kaj ĝiaj aperoj, pasiaj kaj ofte doloraj. Ŝiaj poemoj certe ne estas nur trikoloraj, malgraŭ la titolo, ili estas plenaj de diversaj koloroj. Ŝi verkas pri sia strato en

# LITERATURO DE LA ESPERANTA

nur de tiuj; efektive kio plej impresas en la unua poemaro de Eli Urbanová estas la ardo, kiu ofte transformas la nigrecajn nuancojn en sens-aman tut-aĵon. La lasta parto de la poemaro portas la titolon *Hetajro dancas*; "hetajro" estas helena nomo pri amoristino, tamen ne ordinara profesiulino pri amoro, sed klera kaj altnivela dancistino, kaj kiel tia la poetino sentas sin fone de tiuj poemoj. Ŝi vidas sin en pasia danco antaŭ la amanto, kiu tamen estas iluzio, kaj la fantazia amorado finiĝas en doloro:

*Ne etendas sin en avid' la mano,  
male: Via trajt' - moka rid', rikano!  
Je l'unua fojo, mi verŝante larmon  
kaŝas la ĉarmon ...*

Prago: "En nia strat' nek eta mov', / nek sensacie freŝa nov'". Ŝi verkas pri fantaziaj scenoj kaj fabelaj temoj. La amo kaj ĝiaj problemoj neniam estas longe for. Interesaj estas du maristaj kantoj, neatenditaj de poeto loĝanta en lando sen maro. La temaro estas tre varia, sed ĉiam persone kaj emocie kolorita.

Post *Nur kvin kolorojn* Eli Urbanová verkis ses originalajn poemarojn (la lasta *Ne tro rigardi retro* aperis en 2007) kaj aŭtobiografion, *Hetajro dancas* (1995), kiu vekis grandajn emociojn en Esperantujo pro la sincereco kaj senpruda traktado de ŝia vivo. Ŝiaj kontribuoj al la Esperanta literaturo dum la dua duono de lasta jarcento estis gravaj kaj estas daŭre kaj instige influaj.

# Bildoj el la historio de ESPERANTO

## XII. Esperanto kaj Nobel-premio pri paco

Por Nobel-premio pri paco oni kandidatigis Universalan Esperanto-Asociacion. Plenkore apogante tiun proponon ni tamen mencias, ke la rilato inter Esperanto kaj la pac-klopodoj de la homaro estas pli malnova ol UEA. La ideo pri Lingvo Internacia estiĝis ĝuste kiel parto de la pac-klopodoj.

Dum tri jarcentoj estis preskaŭ tute forgesita fakto, ke la humanisma filozofo *Comenius* okupiĝis ne nur pri edukado, sed ankaŭ pri internacia politiko. Lia verko titolita *La vojo al klero* enhavas detalan projekton pri la paco, kaj la vojoj kondukantaj al ĝi. Nuntempe en universitatoj por politologoj oni jam instruas la pionirajn klopodojn de *Comenius*. En la lastaj jardekoj tiuj premisoj estas realiĝantaj.

*Comenius* en 1688 eksplikis, ke inter la pluraj premisoj de la paco estas ekzemple reciproka sekureca sistemo el reprezentantoj de ĉiu lando. Li emfazis, ke ankaŭ kreo de komuna lingvo estas same grava tasko de la homaro. Tiu komuna lingvo ne estas ajna nacia lingvo, sed lingvo, kiu „*estu la sola komuna lingvo por ĉiu nacio*”, krom kiu „*ĉiu popolo konservu kaj kulturu ankaŭ sian propran lingvon*”, kaj en

kiu okazu ankaŭ la lerneja edukado. Do, premiso de la paco estas, ke lingve kaj kulture neniu subpremu alian etnon.

La nova lingvo laŭ *Comenius* devas esti preciza, fleksebla, riĉa kaj belsona „*por ke estu plezuro lerni kaj ellerni ĝin*”. Ĝi estu multe pli facile instruebla ol la naciaj lingvoj, „*por ke ni povu lerni ĝin sen perdoj tempaj kaj materiaj*”, t. e. plej ekonomie.

Ne mankis konsento, sed neniu, nek *Comenius* sukcesis fari tian lingvon. Pli ol du jarcentojn poste en la grandega Rusa Imperio *Lazar Markoviĉ Zamenhof* spertis, ke ankaŭ ene de la regno estas la sama obstaklo antaŭ la paco. Por forigi la interetnan malamikecon same estas bezonata la nova lingvo, farena laŭ tiuj principoj. Kaj li projektis ĝin.

*Zamenhof* same kiel siatempe *Comenius*, nomis sian novan lingvon universala, sed en la lasta momento antaŭ ĝia apero li donis al ĝi la pli trafan nomon *Lingvo Internacia*. La projekto aperis kaj baldaŭ lingviĝis. Poste ĝi ricevis la nomon Esperanto – la unua kaŝnomo de la aŭtoro – iom post iom iĝis sinonimo de Lingvo Internacia.



En la jarcentoj 20-21-aj ne malgrandiĝis malamikeco konekse kun la lingva diverseco aŭ ĝuste pro ĝi mem. Eĉ pli intense ol iam ajn, ĉie la pli forta potenco klopodas trudi sian lingvon al aliaj etnoj kaj ene de ŝtatoj, kaj en la internacia vivo. Infanoj kaj studentoj pli kaj pli grandan tempon devas dediĉi al lingvolernado. Tiurilataj elspezoj de la ŝtatoj pli rapide kreskas ol la ekonomio. Centmilionoj da infanoj ne rajtas lerni en sia gepatra lingvo. Pro la nuna diverslingveco la homaro havas multe pli grandan perdon ol en la tempo de Comenius.

Kelk-loke jam haltis la kresko de la elspezoj por armeaj, sed la prilingvaj elspezoj impete kreskas plu kaj en la internaciaj organizaĵoj, kaj ene de senescepte ĉiuj ŝtatoj. Apliko de ajna nacia lingvo en internaciaj kaj interetnaj rilatoj ĉiam estas malekonomia kaj direktiĝas kontraŭ aliaj komunumoj, subpremas aliajn kulturojn.

Aliflanke Universala Esperanto-Asocio senkompromise iras plu sur la vojo de Comenius kaj Zamenhof, kaj reprezentas la plej justan kaj plej ekonomian solvon por ĉiu.

---

*Otokar Batlička*

## STRANGA OKAZINTAĴO

„Plen-vapore reen!” kriis en la mallumon viro, kiu gardo-staris. Per rapida salto li aperis ĉe la sonorilo, kiu pendis ĉe la pruo de la kanona ŝipo Banker. Ekscitita tri-foje li batis la sonorilon per duoblaj batoj. Tiu ĉi signalo signifas: „Reen – bariero antaŭ la pruo!” Tuj poste eksonis la ordono de la kapitano al la maŝinejo, kaj post kelkaj sekundoj la ŝipo moviĝis en la kontraŭa direkto.

Oficiro, kiu deĵoris, alkuris al la pruo. „Kio okazis?”

Anstataŭ respondi la viro montris trans la pruon al la mallumo. Kelkcent metrojn antaŭ ili aperis ŝipo. Tio certe ne estus io stranga, sed al tiu ĉi ŝipo evidente io ne estis en ordo. Unue, en tiu ĉi parto de la maro neniam veturis ŝipo sen akompano de gardo-ŝipo de iu eŭropa ŝtato, ĉar tie, en tiu parto de la Ĉina Maro agadis ĉinaj piratoj. Due, la ŝipo veturis sen lumoj, kaj trie – kaj tio estis la plej stranga – ŝajnis, ke la ŝipo estas de neniŭ stirata!

La veloj de la ŝipo turniĝis en la vento kaj de tempo al tempo la ŝipo ŝanĝis sian direkton. Senduba pruvo, ke neniŭ estas ĉe la rudro! Ĉe la pruo amasiĝis ĉiuj oficiroj. Poste la kapitano ordonis lumigi la fremdan ŝipon per lum-ĵetiloj.



Blindige blanka lum-radio trapenetrus la nigran mallumon. En distanco de proksimume kvarcent metroj staris hele prilumigita stranga ŝipo. Estis vel-ŝipo kapabla veturi sur vasta maro. Sur la ŝipo estis videbla neniu vivulo. La rudro estis forlasita kaj nenie estis signo de vivo.

„Sinjoro kapitano, sur la ŝipo ne estas videblaj sav-boatoj. Ŝajnas, ke la tuta ŝipano forlasis la ŝipon!” raportis la dua oficiro, kiu observis la lumigitan ŝipon.

„Sinjoro leŭtenanto, veturu kun kvar viroj en boato al la ŝipo! Vi kaj du viroj trarigardos la ŝipon. Se vi rimarkos ion suspektindan, tuj revenu!”

La ordono estis tuj plenumata kaj boato kun kvin viroj alproksimiĝis al la mistera ŝipo kaj haltis ĉe ĝia flanko. La leŭtenanto singardeme suriris per ŝnur-eskalo. Du viroj sekvis lin.

Unu post la alia ili transsaltis la randon de la forlasita ŝipo kaj staris sur ĝia ferdeko.

„Ho, hoj, kie estas iu!” Neniu respondo!

„Mi rigardos la kapitanan kajuton”, decidis la leŭtenanto. Li faris kelkajn paŝojn sur la ferdeko, kiam...

„Je Dio, haltu, sinjoro leŭtenanto!” ekkriis unu el la viroj.

„For, for!” krias timige la alia, sed lia krio finiĝas en dolora ĝemo!

„Atentu, ĉi tie, tie, ĉie! Tiu ĉi diabla ŝipo estas plena de serpentoj!” vokas la leŭtenanto.

Ili forkuras akompanataj de kolera siblado. Ili saltas en la boaton kaj rapide malproksimiĝas de la stranga ŝipo. La viro, kiu dolore ĝemis, svenas. Serpento venen-mordis lian maldekstran piedon.

Post albordigo la leŭtenanto raportis al la kapitano, kion li trovis sur la ŝipo.

„Sinjoro kapitano, estas por mi tute ne klarigeble, kial la serpentoj troviĝas sur la ŝipo! La tuta ferdeko estas plena de ili kaj, se mi ne eraras, ili estas hindaj kobroj! La maristo Hortis estas venen-mordita!”

La kapitano, surprizita de la okazintaĵo, ordonis telefone informi la havenan estrejon. Tutan nokton la kanon-ŝipo prilumis la danĝeran ŝipon.



Dume la radio-telegrafisto ĉe sia aparato atendis respondon kaj ordonon, kion fari pri la ŝipo kaj ĝia terura ŝarĝo.


La respondo alvenis nur je la oka matene kaj klarigis la sekreton de la velŝipo. Jen la laŭvorta teksto: „Al la kapitano de la kanonŝipo Banker. Ni konfirmas la ricevon de via raporto, kiu koncernas la trovon de la ŝipo Hanan. Ni informas vin, ke la maristojn de la ŝipo savis vaporŝipo. La ŝipanaro donis tiun informon: La ŝipo transportis de Bankoko dudek kestojn kun vivantaj serpentoj por la ŝtata instituto en Bombejo, kiu fabrikas kuracilon kontraŭ serpenta veneno. Dumvoje, pro erara ordigo en la ŝipelo, transŝutiĝis kelkaj malnovaj feraj objektoj kaj difektis la kestojn de

la serpentoj. Sekve kelkaj centoj da ili povis forlasi sian lokon kaj disrampi al ĉiuj anguloj de la ŝipo. La ŝipanaro rimarkis la danĝeron ĝustatempe kaj forlasis la ŝipon. Tio estis unu-sola vojo por savi sin. Ĉar ajna penado forigi la serpentojn estus akompanata de ega danĝero. Mi ordonas al vi sinkigi la ŝipon Hanan!”

Post la ricevo de tiu ĉi informo baldaŭ ektondris kelkaj kanon-pafoj kaj post kvin minutoj sinkis la ŝipo kune kun sia danĝera ŝarĝo al la fundo de la maro.

Tradukis kaj adaptis por JA:

*Dieter Berndt, Germanio*



*boato*: malgranda ŝipeto / *eskalo*: ŝtupetaro / *ferdeko*: supra planko de ŝipo / *kapitano*: ŝipestro / *kobro*: danĝera serpento / *konfirmi*: certigi ion / *leŭtenanto*: malsupra soldata estro / *oficiro*: nomo de armeaj estroj / *pirato*: mara rabisto / *pruo*: antaŭa parto de ŝipo / *rudro*: direktilo de ŝipo / *sibli*: eligi sonon similan al longa s / *signalo*: interkonsentita signo / *sinki*: malrapide malsupreniri / *stiri*: direkti veturilon / *suspekti*: akcepti eblecon de io malbona / *sveni*: fariĝi kvazaŭ mortinta.



## DORLOTBESTOJ

Rubrikestro: Judit Felszeghy

### I. Feliĉaj posedantoj – en parko

- Kiel trankvila kaj malsovaĝa estas via.... Kio ĝi estas?
- Putoro, ĉasputoro ĝi estas, sur mia ŝultro. Kaj en la poŝo kaŝas sin rato. Ili estas ja vere tre amikemaj. Vi povas karesi ilin, ilia felo estas velura.
- Kaj la birdo? Ĉu ĝi ne deziras forflugi desur via kapo?
- Ho, tute ne. Mia papago tre ŝatas sidadi tie, ĝi sentas sin komforte sur mia hararo.
- Baldaŭ ankaŭ mi ekhavos iun dorlotbeston hejme... Sed mi ankoraŭ ne decidis, kiun.
- Mi proponas al vi gard-hundon! Ĝi defendos vin kuraĝe, se iu volos ataki vin, krome vi povos ludi kun ĝi, instrui ĝin!
- Ho jes! Bona ideo! Mi tre ŝatas ludi kun besto forta kaj grand-korpa!
- Ankaŭ serpento povas fortimigi viajn malamikojn! Multaj pensas, ke serpento estas bestaĉo sen sentoj kaj cerbo. Sed miaj pitonoj kaj viperoj rekonas min, kaj ili ŝatas restadi en la proksimeco, eĉ tordiĝi ĉirkaŭ mi.
- Ĉu tiu ĉi ne mordos min, se mi tuŝos ĝin?
- Ne, ne timu. Vi sentos, ke ĝia haŭto estas seka, varmeta. Estas agrable, ĉu ne?
- Jeeees... vere.
- Sen kompanio de dorlotbesto, la vivo estas mizera!

### II. Argumentado – hejme

- Panjo, ĉu vi ne trovas, ke ni devus havi iun beston hejme?
- Ĉu beston? Ĉu ĉi tie? Ĉu en blokdomo en la kvina etaĝo? Pri kiu besto vi pensas? Ĉu kokonon por ricevi ovojn?
- Ne. Mi pensis pri... iom pli granda...
- Ĉu pri porko? Neniel, kara mia! Tio estas tute malebla!
- Ne, ne! Mi pensas pri dorlotbesto,



ne pri dombesto.

- Oni devas zorgi ankaŭ pri dorlotbestoj! Ĉu vi aĉetos manĝaĵon por ĝi?
- Jes, certe! Panjo, mi bezonas iun besteton...
- Je via konto, el via poŝmono!
- Hm... jes!
- Kaj ĉu vi purigos la loĝejon, kiam la besto malpurigos ĝin?
- Jes, panjo! Do, ĉu vi permesas, ke mi aĉetu iun?
- Jes, kondiĉe ke vi prenos sur vin ĉiujn zorgojn kaj kostojn!
- Jes, mi akceptas tion! Dankon, panjo! Sed.... Kio pri Paĉjo...? Ĉu vi konvinkos lin?
- Mi parolos kun li, kaj trovos argumentojn, ke ankaŭ li konsentu.

### ***III. Realigo de la revo – en vendejo***

- Kion manĝas tiu ĉi hundeto?
- Tiu ĉi hundeto estas ankoraŭ hundido, tri-monata. Por ke ĝi bele kresku, kaj atingu ĝian kutiman 60 kilograman pezon, kaj ne ekhavu problemojn pri la ostoj, necesas doni al ĝi miksitajn manĝaĵojn, kiu enhavas sufiĉe da vitaminoj, kalcio, magnezio.
- Jes, certe. Kiom kostas pakaĵo da tia-speca manĝaĵo?
- Tiu ĉi sufiĉas por tuta semajno, kaj ĝi kostas ... jen, vi vidas ĝian prezon. Se vi tamen aĉetos dek pakaĵojn samtempe, vi gajnos senpage unu artefaritan oston, kiu estas nepre bezonata por la sana kresko de la dentoj. Kaj se vi aĉetos ĉe ni buŝumon – sen kiu vi poste ne povos promenigi la hundon – vi ricevos ankaŭ broson por ĝia felo. La tuto kostas ...
- Ho, dankon! Kaj tiuj ĉarmaj bestetoj, en la kaĝo? Ĉu mi povos aĉeti ankaŭ la vitran kaĝon kun la bestoj?
- Ili estas paro de kobajoj, kaj ni vendas ankaŭ la vitran ujon. Vi povos aĉeti jam nun unu plian dometon por ili, ĉar ili baldaŭ havos idojn. La lignerojn, kio estas por ili la kuŝ-pajlaĵo, necesas ŝanĝi ĉiutage, kaj aĉetu ankaŭ...
- Mi fakte deziras aĉeti iun tute ekzotikan beston...
- Tiu ĉi serpento estas jam teorie tute sendanĝera. Antaŭ nelonge estis forigita ĝia venen-saketo, sed por certeco, de tempo al tempo necesas kontroligi, ĉu la venensaketo, ĉe la venendentego ne rekreskis. Eĉ tiel tamen prefere eviti ĝian mordon... kaj estas utile, se vi ĉiam kunhavas la dokumenton pri la serpento, kaj la nomon de la proponita kontraŭvenena substanco, ĉar ne ĉiu hospitalo estas preparita por tiaspeca akcidento... Ni, cetere, vendas ankaŭ musojn por manĝaĵo...
- Ĉu vivantajn?
- Jes, certe. Ĉar se la muso jam estas mortigita, tiam...



- Dankon, dankon! Mi scias... Kaj la papago...? Kiuj zorgoj estas pri ĝi?
- Bone vi elektis! Fakte, preskaŭ nenio, jam! Ĝiaj flugiloj estas fortranĉitaj, kaj ĝi povas nur saltadi en tiu granda kaĝo, kie estas diversaj, interesaj ludiloj por ĝi... Eblas aĉeti la kaĝon ankaŭ kun la ludiloj, ŝtupareto, balancilo, sid-ringo... Sed necesas esti atenta, por ke la birdo ne eliru, ĉar ĝi povas fali teren, kaj...
- Ho, dankon. Mi opinias, ke mi jam vere decidis.

## Taskoj:

- *Vicigu, kiujn dorlotbestojn havas viaj geamikoj, kaj kiuj estas aĉetebraj en via lando!*
- *Iniciatu konkurseton kun viaj geamikoj: kiu konas (sen helpo de vortaro!) la nomojn de plej multaj bestetoj (dorlotbestoj, eĉ dombestoj). Poste daŭrigu la ludon, kion ili manĝas, kaj kiel „parolas” la vicigitaj bestoj (ekz. la kato miaŭas)!*
- *Trovu bildojn pri diversaj bestoj, nomu ilin esperantlingve, kaj prezentu ilin al viaj geamikoj.*
- *Rakontu, kiujn zorgojn kaj taskojn havas la posedanto de dorlotbesto. Pensu ne nur pri nutrado, sed ankaŭ pri malsanoj!*
- *Preparu skribe aŭ rolludu la finon de la supra dialogo: kiel ĝi disvolviĝis, kion diris la infano, kaj kio estis la rezulto de la bestovendeja vizito!*
- *Imagu, ke posedanto de bestovendejo petas vian helpon por prepari afiŝon, por ke la vendotaj bestoj estu pli popularaj kaj pli bone, pli rapide venditaj. Preparu por li tiun afiŝon. Tiun vi povos sendi ankaŭ al nia redakcio, kvankam, Juna Amiko ne okupiĝas pri vendado de dorlotbestoj.*
- *Prezentu mallongan rakonteton pri iu (okazinta aŭ imagita) evento rilate dorlotbeston.*

*argumento:* racie akceptebla pruvo / *balanci:* ritme movi tien kaj reen / *dorloti:* tre delikate, am-plene trakti iun / *ekzo(ik)a:* devenanta el tre malproksima lando / *felo:* besta haŭto kun haroj / *iniciati:* kiel unua proponi aŭ fari / *karesi:* delikate tuŝi por montri sian amon al iu / *kobajo:* mam-besto ronĝulo / *kompanio:* grupo, kunestado, akompanado / *pajlo:* seka tigar de pan-herboj / *tordi:* forte ĉirkaŭvolvi

## ANEKDOTO

Finna profesoro *J. W. Chydenius*, promenante en strato de Helsinko, koliziis kun alia strabulo kaj indigne diris al tiu:

*„Rigardu, kien vi iras!”*

La alia respondis same indigne:

*„Iru, kien vi rigardas!”*

*Saliko*

# Kanĵi kaj Amane

Familiaj Rakontoj

de Jasuo Hori, kiu ĵus ricevis la unuan premion de la Belarta Konkurso

*En iu urbo de Japanio loĝas du infanoj nomataj Kanĵi kaj Amane. Kanĵi estas 4-jara kaj havas deziron fariĝi direktisto de orkestro. Rigardante orkestron aŭ kantistojn en televido, li ĉiam svingas bastoneton. Amene estas 2-jara kaj ĉiam ankoraŭ volas mamsuĉi. Ili estas gefiloj de Takeo, ilia patro, kaj Acuko, ilia patrino. En la sama domo loĝas ankaŭ la gepatroj de Acuko. Ilia domo troviĝas apud lageto. La domo estas ĉirkaŭita de kampoj de iliaj geavoj.*

## Sento de homoj

Kanĵi kaj Amane vizitis la najbaran vendejon. Surprize ili trovis tie Taman, unu el la katoj, kiuj loĝas en ilia ĝardeno.

**Kanĵi:** “Saluton, Tama. Por kio vi venis ĉi tien?”

**Tama:** “Estas enuige nur sidi en via ĝardeno. Ankaŭ katoj bezonas distraĵon. Jen mi legos tiun ĉi libron titolitan ‘Sento de homoj\*’. Mi volas scii kial vi, Kanĵi, tiel ofte svingas bastoneton, kaj vi, Amane, kial vi ripetas ofte: ‘Mamon, mamon!’”

**Kanĵi:** “Ĉu vi jam komprenis la kialojn?”

**Tama:** “Ne, tamen mi scias, ke precipe infanoj nenion timas. Ili ne havas pasintecon, sed nur estontecon”.

**Kanĵi:** „Kaj...?”



**Tama:** “Pro tio estas malfacile diveni, kion ili faros en la sekvanta momento. Nur plenkreskuloj agas laŭ iom da reguloj”.

**Kanĵi:** “Kaj ĉu la katoj?”

**Tama:** “Katoj havas nek pasintecon, ili havas sole nunon”.

**Kanĵi:** “Kaj kio estas via nuno?”

**Tama:** “Mi estas malsata! Aĉetu por mi sekigitan fiŝon. Mi volas manĝi ĝin en via ĝardeno kun vi.”

**Kanĵi:** “Bone. Por ni mi aĉetos ĉokoladon. Ni kune revenu hejmen kaj gustumu la bon-gustaĵojn.”

*\* En Japanio aperas revuoj “Sento de katoj” kaj “Sento de hundoj”*





## Esperanto kaj mi

Esperanto estas por mi vivstilo, lingvo, en, per kaj por kiu mi vivas.

Mi ne estas denaska esperantisto. Mi eklernis ĝin en plenkreska aĝo, sed ĉar mi estis lingvoinstruisto kaj matematikisto, la logiko de la lingvo kaj la eblo rapide kaj facile ellerni ĝin ravis min. Post la rapidaj kaj pozitivaj spertoj mi tuj ekinstruis la lingvon en la ĝenerala lernejo, kie mi laboris. Miaj lernantoj ŝatis la lingvon, ekkorespondis helpe de ĝi kun eksterlandanoj, partoprenis konkursojn kaj renkontiĝojn. Mi kun ĝojo rimarkis, ke dum la lecionoj de la rusa lingvo la samaj lernantoj komencis progresi pli rapide, komparis la lingvojn, mirigite malkovris similaĵojn. Ekzemple tia malkovro estis por hungaroj la ekzisto de genra diferenco en pronomoj kaj substantivoj, funkcio de prepozicioj, ĉar en nia gepatra lingvo tio mankas. Tiujn funkciojn ni esprimas per vortofinaĵoj, kiel ni esprimas ankaŭ la agantojn kaj posedantojn (kaj pro tio ne bezonas uzi personajn pronomojn).

'En miaj bareloj' en la hungara estas '**hordóimban**' (prononcu: hordooimban)

hordó = barelo

hordóm = mia barelo ('m' signifas posedon en la unua persono)

hordó**mban** = en mia barelo ('ban' signifas 'en')

hordók = bareloj

hordó**im** = miaj bareloj (ĉi tie kunfandiĝis la pluralo kaj ies posedo)

hordó**imban** = en miaj bareloj (nun vi vidas, ke temas pri pluraj miaj bareloj, en kiuj estas io)

La strukturo de la plimulto de la lingvoj, kiujn oni lernas en Hungario, estas tute alia ol la strukturo de la hungara. Mi pensis, ke hungaroj pli facile lernas fremdajn lingvojn se ili devus ne samtempe renkonti kaj strukturajn kaj specifajn malfacilaĵojn de la lernataj lingvoj. Tial estus utile unue instrui lingvistikajn konceptojn kaj universalaĵojn, kaj nur poste enkonduki la unuopajn vortojn kun ties ortografiaĵoj kaj prononcmalfacilaĵoj (angla, franca), atentigi pri genroj de substantivoj kaj pronomoj (germana, franca, rusa ktp.)

Nu, Esperanto pro sia reguleco kaj logiko, ŝajnis eliksiro por sukcesa lingvolernado. Mia celo estis per ĝi montri la funkcion de alia (ne-hungara) lingvo kaj ebligi la akiron de spertoj pri funkcio de ne-gepatra lingvo. La rapida progreso de la lernantoj donis ankaŭ sukcesosenton, kio estis plusa gajno. La lernitaj internaciaj vortoj kalkuliĝas kiel plia avantaĝo.

Mi komencis disvastigi Esperanton en mia familio, en miaj lernejoj, bazaj, mezaj kaj fine ankaŭ en la pedagogia altlernejo, kie mi trejnus studentojn pri tio kiel bone instrui ankaŭ Esperanton.

Estis tempo kiam mi aplikis ĝin kvazaŭ kiel terapion kun personoj, komplete fiaskintaj en siaj lingvolernaj provoj. (Cetere unu el la brilaj sukcesintoj nun jam parolas kaj instruas multajn lingvojn kaj regule kontribuas ankaŭ al Juna Amiko. ☺)

Mi tiom kredis en la enkonduka valoro de Esperanto, kion per fakvorto oni nomas *propedeŭtika valoro*, ke mi plu studis ĝin kaj pri tiu temo mi verkis mian doktorigan disertaĵon en 1993.

Mi analizis kiel la internacia lingvo povas helpi al hungaraj lernantoj lerni la italan lingvon.

Pasis multaj jaroj. Nun mi loĝas en Nederlando. Mi ne plu laboras en universitato, sed instruas Esperanton kaj trejnus instruistojn mondscale. De 2001 mi funkciigas la porinstruistan retejon [www.edukado.net](http://www.edukado.net), kie mi disponigas informojn, lernomaterialojn kaj diversajn helpojn por Esperanto-instruistoj, por ke ilia laboro estu pli facila, pli efika kaj tre bonkvalita.

Ĉirkaŭ dumil personoj uzas la materialojn de mia retejo. La ekzercoj de la *Lerniloteko* estas elŝutitaj pli ol 100 mil fojojn, kaj se la instruistoj uzis ilin averaĝe nur kun 5 lernantoj, la sumo atingas duonmilionon. Mi kontentas kaj feliĉas pro tiu sukceso.


Krom la reta klerigado mi multe vojaĝas, trejnus instruistojn, gvidas ĉeestajn kursojn, regule dum UK-oj, en la Esperanto-fako de la pola universitato Poznan, dum la somera kursaro NASK en Usono kaj en multaj Esperanto-aranĝoj. Danke al tio mi ekhavis multajn interkulturajn spertojn kaj amikojn.

La internacia lingvo estas ankaŭ nia familia lingvo, ĉar kun mia franca edzo kaj nia kvarlingva 8-jara filo ni uzas ĝin kiel unusolan komunan lingvon, kiun ni ĉiuj plej bone regas el la multaj lingvoj, kiujn ni unuope kapablas paroli.

Esperanto estas lingvo, kiu donis al mi lernoplezuron, laboron, multajn amikojn, vojaĝaventurojn kaj kiu estas la ilo dividi sentojn kaj pensojn en nia familio. Ĝi estas mia vivo.

\* Kovaac





## Kiel dialogi pri Esperanto

Kiu lernas aŭ volas lerni Esperanton, ofte renkontas kaj pozitivajn kaj negativajn opiniojn, kiam ŝi / li mencias al iu pri sia decido. Ankaŭ vi certe spertis tion, ĉu ne? Kaj estas grave, kiel oni akceptas aŭ malakceptas reagojn.

Ni rigardu, do, kelkajn konkretajn situaciojn. Aŭdante, ke vi lernas/os Esperanton, oni ofte ekparolas jene: *Ĉu Esperanton? Oni nenie parolas ĝin.*

Nu, kiel respondi tian kategorian konstaton? Ne forgesu, ke ĉiam per faktoj, logikaj argumentoj oni devas reagi. Kolero, malrespekto aŭ moko neniam kondukas al konvinko, male tio rezultigas malsimpaton aŭ malamon al vi kaj al la tuta traktata afero. Plej sukcese oni povas reagi, se oni parte akceptas la konstaton de la interesiĝanto. Mi, ekzemple, respondus jene: *Antaŭ unu jaro ankaŭ mi opiniis tion, ĉar oni preskaŭ nenion aŭdas pri nuntempaj esperantistoj kvaŭzaŭ ili ne ekzistus. Fakte ne multaj parolas Esperanton, sed nun surpriziĝu: Ĝi estas parolata en la tuta mondo, de Nov-Zelando ĝis Islando, de Togolando ĝis Japanio. Preskaŭ ĉie estas landaj E-asocioj, kiuj havas superan Universalan E-Asociacion en Roterdamo. Prezentu al vi, ke antaŭ kelkaj semajnoj ok britaj parlamentanoj proponis ĝin kandidato al Pac-premio Nobel por la jaro 2010. Esperanto jam havas post si pli ol 120 jarojn. Ĉu vi aŭdis pri tio, ke ĉi-jare okazos jam la 95a Universala Kongreso, t.e. tutmonda kunveno de esperantistoj, ĉi-jare en Havano (Kubo), venontjare en Kopenhago (Danio) kaj en 2012 en Hanojo (Vjetnamio). Mi povus paroli pri multaj internaciaj renkontiĝoj, pri radio-elsendoj, gazetoj, E-lingvaj retejoj kaj multaj interesaj kaj tre utilaj aktivadoj.*


Post tiom da frazoj, vi certe estos interrompita per nova demando. Verŝajne pluraj reagos jene: *Se ili tiel bone komprenas sin reciproke pere de Esperanto, bv. diri al mi, kial la plimulto de la homaro ne sekvas ilian ekzemplon?*

Jen unu el la plej malfacilaj demandoj. Certe ekzistas pluraj kaŭzoj. Mi eble reflektus, komence, jene: *Vi mem ĵus konstatis, ke neniu parolas ĝin. Ĉu vi volonte lernas ion, kies utilecon vi ne vidas. Ĉiu preferas laŭmodajn solvojn. Esperanto ne havas bonan propagandon.*

*Kaj kial ne, se ĝi estas sukcese uzebla de multaj popoloj? Pro almenaŭ du kaŭzoj. Eĉ nacia reklamado bezonus centoble pli da mono. Prezentu al vi, kiom bezonus tutmonda propagando. La nuntempa E-movado subvencias sin per la kotizoj de la membraro, krom kelkaj sindonaj mecenatoj. Aliflanke, la naciaj lingvoj, kiuj strebas al parta aŭ plena tutmondiĝo, ricevas financan subtenon altegan, se ne paroli pri tiuj miloj, kiuj ĉiu-jare translokiĝas por unu aŭ du jaroj a. la hejmlando de la cellingvo kaj tio alportas grandan profiton al ili.*

# LINGVA DOKTORO

## Lando-nomoj en Esperanto



Povas esti, ke en nia lingvo la landonomoj estas la malplej regulaj. Kial? Tial, ke laŭ la lasta, 16a regulo de nia baza Zamenhofa gramatiko, la internaciaj vortoj estas uzataj sen ajna ŝanĝo (escepte ortografion kaj la gramatikan finaĵon). Kaj la landonomoj preskaŭ senescepte apartenas al tiuj vortoj.

La landonomoj dividiĝas laŭ du grandaj grupoj. La unua konsistas el vortradikoj, kiuj mem signas landon. Ekzemploj: *Kanado*, *Urugvajo*, *Usono*, *Israelo*, *Brazilo*, *Meksiko*, *Zimbabvo*, *Burundo*, *Madagaskaro*, *Peruo*, *Kubo*... , la alia grupo formiĝas el la nomo de popolo kiel ekzemple ĉe vortoj: *Germanio* (<*germano*), *Italio* (<*italo*), *Ĉinio* (<*ĉino*), *Turkio* (<*turko*), *Rusio* (<*ruso*) ktp. Sed la afero ne estas tiel simpla. Laŭ la formo ĉiu esperantisto pensus do, ke en *Alĝerio* loĝas ĉefe alĝeroj. Tio estas grava eraro, ĉar tia etno ne ekzistas. *Alĝero* estas la ĉefurbo de la lando. Similaj erarigaj esceptoj estas: *Niĝerio* (*Niĝero* estas la ĉefa rivero de la lando), *Meksiko* kaj *Brazilo* (ili estas ankaŭ ĉefurboj. Por diferencigi la ĉefurbon mi rekomendas vort-kunmeton: *Meksik-urbo*, *Brazil-urbo*)... Pro tio lastatempe en la „regulaj” formoj oni rekomendas denove uzi la fundamentan sufikson por landonomoj: *-uj* (Anna Löwenstein: „Konciza klarigo

pri la landonomoj en Esperanto”), t.e. *Germanujo*, *Italujo*, *Ĉinujo*, *Turkujo*, *Rusujo* ktp. La aliaj landonomoj kun *-io* apartenas al la unua grupo, kiuj ĉiam devenigas la nomon de la civitano per sufikso *-an*, nome: *kanadano*, *urugvajano*, *usonano*, *israelano*, *meksikano*... kaj ankaŭ *alĝeriano*, *niĝeriano*, *ĉiliano* ktp.

Ekzistas pluraj regnoj, kiuj formas sian nomon per *lando*: *Nederlando*, *Islando*, *Gronlando*, *Niĝerlando* (norde de Niĝerio), *Irlando*... Kiam „lando” apartenas al la radiko aŭ en kunmetaĵo la unua radiko ne indikas landon (kiel ekz. en Niĝerlando) oni formas la nomon de la loĝantoj kiel la ceterajn en la unua grupo, per *-an*: *nederlandanoj*, *islandanoj*, *irlandanoj* ktp. Kelkfoje ankaŭ la vortoj de la dua grupo uzas kunmetaĵon per „lando”: *Finnlando* (la plej ofte uzata formo), *Ruslando*, *Greklando* k.a.

Fakte, estus pli logike, reveni al la formoj kun „ujo”, des pli, ke *-io* havas plurajn signifojn. Pensu, ekzemple, pri *biologio*, *demokratio*, *stenografio*, *higienio* k.a. Sed iri kontraŭ globala internaciigo, verŝajne ne alportos sukceson. Nia lingvo ofte havas, do, plurajn vortojn por indiki iun landon. Vidu ekzemple kelkajn sinonimojn: *Polujo*, *Polio*, *Pollando*/ *Danujo*, *Danio*, *Danlando* / *Vjetnamio*, *Vjetnamujo*, *Vjetnamlando*...



# KVIZO-LUDO

Prizorganto de la rubriko: *Dieter Berndt, Germanio*

*Karaj kvizemuloj,*

*ni pardon-petas pro la neregula elirado de la revueto. Kiel vi spertas ankaŭ la „aprila n-ro” aperis kun granda malfruo. Tamen mi esperas, ke baldaŭ ĝi reprenos la normalan ritmon kaj ĉio iros glate. Ĝis tiam mi bezonas vian paciencon.*

*Mi esperas, ke ankaŭ ĉi-foje vi trovos plezuron ĉe la solvado de la taskoj. Sukcesojn deziras*

*Dieter Berndt*

## N-ro 1 (Limdato: 01-08-2010)

1	Kion faras jenaj homoj: <i>tajlorino, ĉarpentisto, masonisto</i> ?
2	Kion vi scias pri bovino ? (5 frazoj)
3	Kion signifas jenaj mallongigoj: <i>bv. / k.a. / rim. / p. / del. / irk</i> ?
4	Decidu, ĉu se aŭ <i>kiam</i> ! ... <i>vi ne venos ĝustatempe, mi foriros. Li venis, ... mi ne estis hejme. ... morgaŭ ne pluvos, ni ekskursos.</i>
5	Mallongigu la frazojn helpe de <i>-ig, -iĝ</i> . <i>La kelnero metis la manĝaĵon sur la tablon. Mi metis en la buŝon grandan pecon de pano. Reveninte hejmen, mi tuj metis min en la liton.</i>
6	Ŝerca demando! Kiu libro povas flugi? ( <i>E.E.Popoviciu, RO</i> )
7	Ĉe tiuj ĉi vortoj intermiksiĝis la literoj. Ĝustigu ilin! (Temas pri arbo, besto kaj mizikilo) <i>TERNALKO, HARSTAMO, TANALPO</i>
8	Skribu tri vortojn tri-silabajn, kiuj estas legeblaj en ambaŭ direktoj (ne konsideru la finaĵon). Ekzemplo: <i>radaro</i> ( <i>M.Molnar, HU</i> )
9	Kiu artikolo en tiu ĉi numero de Juna Amiko plaĉis al vi plej multe ?
10	Faru vi mem demandon, kiu povos aperi en iu sekva numero. Ne forgesu skribi vian nomon kaj landon!

La solvojn sendu rete aŭ papere al s-ro *Dieter Berndt* (*esperanto-berndt@web.de*) / Berolinastr. 2, DE-10178 Berlino, Germanio). Se vi havas demandojn, turnu vin al li, kiu volonte informas pri detaloj.

## **SOLVOJ de la antaŭaj n-roj**

**(septembro 2009)**

1. La 1an ... ; la ĉefurbon ... ; la francan ... ; la vizito 2. Diversaj. 3. Diversaj. 4. pli, ol, (mal)plej, el 5. maniko – paniko 6. Ĉerko. 7. kakatuo, kordelo, akcipitro 8. orelo – taso – du 9. Zakopane, Pollando

**(decembro 2009)**

1. Diversaj respondoj. 2. ... pro ŝia beleco. ... da homoj. Je mia ... 3. Ekz. Nia grupano estas fervojisto. 4. Kiu, tiu, ĉiuj, neniu, neniu, tiu 5. Diversaj. 6. Poŝtmarko. 7. Diversaj. 8. ponto – monto 9. iri – prezentas movon; vidi – por aliaj oni bezonas buŝon; abio – konifero

**La plej bonajn solvojn sendis:**

*Blanka Hužerová, CZ (18 poentoj); Maria Molnár, HU (18 p.); Jindřiška Drahotová, CZ (16 p.); Zoran Stojanović, SR (13 p.)*

**Jen la listo de la kvizo-ludantoj en 2009**

1. Maria Molnár	HU	61 poentoj
2. Zoran Stojanović	SR	56 poentoj
3. Milada Kolařová	CZ	37 poentoj
4. Eugenia-E. Popoviciu	RO	36 poentoj
5. Jindřiška Drahotová	CZ	20 poentoj
6. Blanka Hužerová	CZ	18 poentoj
7. Monika Picková	CZ	17 poentoj

***Ni gratulas al vi ĉiuj, aparte al la gajninto Maria Molnár (HU) !***

*Nia kara hungara amiko, Attila Varró tradukis la tekston de la iam tre populara etpionira kanto.*

**Jen hirundoj jam revenis, nestojn faris ili.  
Suno brilas, ni deziras tuj tendaren iri.  
Floroj pompas ĉie dise, ravas la vidaĵo.  
Kanto vokas, venu, venu, ekas la tendaro!**

*Nun ĝi eble vekas agrablajn sentojn en multaj pli aĝaj homoj, kaj legante, la nun-tempaj geknaboj povas travivi la sentojn de gepatroj, geavoj.*



Fino de Verda Paĝo (p.46)

*Kaj kial la esperantistoj ne petas la financon helpon en siaj landoj?*

*Potencaj regnoj, kiuj deziras tutmondigi sian lingvon, eĉ perbuŝan apogon ne donas, des malpli financon. La malgrandaj ŝtatoj, vidante, ke nuntempe ĝi ne estas vaste uzata, sekve estas neprofito-dona, nun preferas lingvojn, kiuj sukcese ebligas por ili transnaciajn kontakton ekonomian kaj politikan.*

*El tio rekte sekvas, ke Esperanto havas nenian ŝancon.*

*Ĉu vi trovas? Komence ankaŭ mi opiniis tion, sed poste, leginte, ke malgraŭ atakoj, malpermesoj, persekutoj ĝi jam transvivis 123 jarojn, mi longe pensis kaj trovis tiujn proprecojn, kiuj donas esperon al triumfo. Ĝi ne hazarde havas la nomon Esperanto.*

*Ĉu vi scivolas pri la argumentoj? Vi trovos plurajn en la sekva numero.*

## 41a Internacia Infana-junula Kongreseto

okazos dum la 95a UK en Havano, Kubo

kun ĉiuj aĝoj, kutime 7- ĝis 16-jaraj.

Detaloj: [bertosch.free.fr/iik2010](http://bertosch.free.fr/iik2010)

# KONTAKTO

*Dumonata socikultura internacia revuo  
de la esperantista junularo (TEJO).*

*Ĝi enhavas interesajn artikolojn ankaŭ facillingvajjn.*

**Eldonanto** de JUNA AMIKO: ILEI (jura sidejo: CO de UEA, Roterdamo, Nederlando).

**Redaktoroj:** Géza Kurucz (Hítel u. 10. fsz. 16, HU-6000 Kecskemét, Hungario, [geza@banyai-kkt.sulinet.hu](mailto:geza@banyai-kkt.sulinet.hu)), S. MacGill (*aganta*) (Pannónia u.30.I.6, HU-1136 Budapest, [stefan.macgill@gmail.com](mailto:stefan.macgill@gmail.com)) **Lingva revizianto:** Baldur Ragnarsson (Islando).

**Kunlaborantoj:** s-ino Saliko, Anja Karkainen, Vesa Pölkki (Finnlando), Elena Nadi-kova (Rusio), Neringa Gaus (Litovio), Jean Monique Noël (Francio), Jadranka Mirić (Serbio), s-ino Saranath (Hindio), Dieter Berndt (Germanio), Evandro de Freitas (Brazilo), Juliana Vas-Szegedi, Elizabeta Rajtmár, Zoltán Kurucz, Monika Molnár, Judit Felszeghy, Hajnal kaj Karina MacGill (Hungario), Marija Belošević (Kroatio), Michel Nkwirikiye (Tanzanio), Eugenia-Ecaterina Popoviciu (Rumanio), José J. Campos Pacheco (Kubo), Jasuo Hori (Japanio), Gian Piero Savio (Israelo), Nguyen Thi Ngoc Lan (Vjetnamio), Małgosia Komarnicka (Pollando). **Grafikistoj:** Pavel Rak (Ĉeĥio), Monika Molnár (Hungario). **Komputila kolora tekniko:** János Bakk (Hungario)

Presita en Budapeŝto, Hungario

**Administranto:** Stefan MacGill (adreso supre)

**ISSN 0230 1318**

La sekva numero aperos en septembro

Por pliaj detaloj vidu

# MANLIBRO pri INSTRUADO de ESPERANTO



Projekto "Flugiloj de Malfacila Vento", 2005



**ilei**

Esperanto@Interreto  
Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

la prezenton <edukado.net>



Part' anĝelo, part' abelo  
Flugil-par' - aparta belo.  
Kapokrone, har' taŭzita  
De la freŝa vent' kaŭzita.  
Per majesta robo-plekto  
kompletiĝas la aspekto.

Jen flugiloj plumoplenaj  
Du okuloj bril-serenaj.  
Kun espero kaj aspiro  
Pri probabla flor-aliro.  
Pli konkrete eĉ sopiro  
Al miela ĉerp-akiro.



Elrigardo altenira  
Al celado suprentira,  
Kun espero kaj mem-fido  
Al estonto kun klarvido.  
Por junulo sen ektimo  
Nur ĉielo estas limo.

*Bildo: Karina MacGill*  
*Teksto: Stefan MacGill*